XXa jaro. No 282 (2) ☆ Monata ☆ Februaro 1924

ESPERANTO

Oficiala organo de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

JARA ABONO

Simpla abono . . . . 10.— Fr. Sv.
Kun la membreco de UEA . . . . 12.50 Fr. Sv.
Unu numero . . . . 1.— Fr. Sv.
Svisa poŝtĉeko I. 2310. — La abonoj komenciĝas en januaro

REKLAMO

Anonco (unu centimetra kolonero) . . . . . 2.— Fr. Sv.
Anonceto (1 linio: 10 vortoj) . . . . 0.50 Fr. Sv.
Korespondado (1 enskribo) . . . . 0.75 Fr. Sv.
Vidu naciajn prezojn en la koncerna fako!

FONDINTO: HECTOR HODLER — GVIDANTO: D-ro EDMOND PRIVAT
ADRESO DE LA REDAKTEJO KAJ ADMINISTREJO: 12, BOULEVARD DU THÉÂTRE, GENÈVE
La Redaktejo ne povas resendi manuskriptojn. Lasta dato por ricevo: la 15a de ĉiu monato. Oni skribu tre legeble kaj konservu kopion

TEKSTO. — *La Aprila Kunveno en Genève,* Edmond Privat. — *La semajno de UEA* (18). — *El Orienta Saĝo: La filozofio de Budha,* Won Kenn (19). — *Adiaŭo de japana artisto al Eŭropo,* Shigeo Narita (21). — *Belarta Vivo: Trovo de unu „Giorgione",* H. Moser (22). — *Novajn templojn por la venonta epoko,* Serge Withman (22). — *Pensoj pri la Vivo: Agoforto kaj rapido,* N. Roerich (23). — **Socia Vivo:** *La mirindaj entreprenoj de Ford,* E. Archdeacon (24). — **Poezio:** *Aŭtuno,* Friedr. Jahn. *Renkonto,* J. Baghy (24). — **Literaturo:** *La Gers'a Lago,* Rod Toepffer (25). — *Frederiko Smetana, la patro de la ĉeĥa muziko,* Paul Bennemann (26). — *Milito,* Guy de Maupassant (27). — *Tra la libraro* (27). — *Lingvaj Studoj: La Lingvo Disvolvanta,* Petro Stojan (28). — **Tra la mondo esperantista:** *Informilo de Esp. Societoj, Kroniko, Alvokoj* (29). — *UEA, Oficiala Informilo* (33). — **Inter ni:** (34). — *Tra la gazetaro* (34). — *Esperantista Vivo.* — *Niaj mortintoj* (35). — *Ŝako* (35). — *Reklamo* (36).

La Aprila Kunveno en Genève.

Jam venis el pluraj landoj aprobaj respondoj al nia lastnumera alvoko por *certigi nian bazon.* Oni komprenas nun kiom urĝas tiu necesega koncentrigo de fortoj. Kelkaj skribas, ke UEA povus tre bone havi 20.000 membrojn kompare kun la suma nombro de esperantistoj. Pri tio ni devos serioze priparoli en Ĝenevo la 21—23 aprilo kun la reprezentantoj de la naciaj societoj kaj vidi kiamaniere ni povas helpi unu la alian.

Same pri la teknikaj aferoj. Oni sentas la devon uzi la jam forĝitajn ilojn antaŭ ol forĝi tuj novajn. Certe la rezultatoj de Venezia pli kaj pli multiĝas. Tri komercaj lernejoj ĵus enkondukis Esperanton kiel *devigan* instruadon: unu privata en Bern, unu oficiala en Praha (porblindula) kaj la Supera Virina en Parizo. La itala esp. Federacio ricevis ministran permeson aranĝi kursojn en la komercaj lernejoj same kiel ĝi jam sukcesis pri la maristaj. La Londona Komerca Ĉambro oficiale anoncas siajn esp. ekzamenojn por 3 junio (enskriboj ĝis 31 marto) kaj la Brita Komercista Komitato fondita de S-ro Edmonds daŭrigas disvastigi eksterlande la raportojn de Venezia.

Nun venas tute ĝuste la momento por aranĝi la samtempan instruan eksperimenton deciditan en Venezia kaj ni kore esperas, ke ĉiuj naciaj societoj favore respondos al la invito de S-ro Edmonds sendante al Ĝenevo kompetentan delegiton kun preta plano. Siaflanke UEA ankaŭ invitas siajn komitatanojn, delegitojn kaj subtenantojn, kiuj povos veni, ke ili informu la C. O. kiel eble plej frue. Pri la hotelservo, pri la gvidfolioj, pri la ĉekoj ekzistas diversaj planoj pri kiuj urĝas akordiĝi aŭdinte la ĉefajn opiniojn.

Ankaŭ depost la Venezia rezolucio pri radio-telefonio en nia lingvo, tiu afero tre rapide disvastiĝis. Oni disaŭdigis Esp.-paroladojn kaj koncertojn el London, Newcastle, Bournemouth, Praha, Moskvo, Parizo. UEA aranĝas ankaŭ ion el Ĝenevo. Nun venis la tempo kunordigi tiujn aferojn kaj ebligi nian lingvon ludi regule sian rolon kiel tre klara kaj komprenebla radio-mondlingvo. La senfadenistoj pretaj veni Ĝenevon pri tio kaj dezirantaj apartan kunsidon bonvolu ankaŭ sin anonci tuj al ni.

En Ĝenevo la partoprenontoj povos komforte loĝi kaj manĝi por dek svisaj frankoj potage kondiĉe, ke ili enskribiĝu jam sufiĉe frue antaŭe. La urbestraro disponigis al UEA la belan palacon Eynard por la kunsidoj kaj bonvenigos la oficialajn delegitojn por solena akcepto.

UEA deziras koran bonvenon al ĉiuj, kiuj venos viziti ĝian Centran Oficejon kaj vidi pli proksime kiel ĝi laboras.

Edmond Privat.

La semajno de UEA.

Al ĉiuj delegitoj kaj amikoj de UEA, kiuj parolados dum la fino de februaro por varbi novajn anojn al nia Asocio, ni sendas koran dankon kaj bondeziron. Al nia alvoko jam respondis favore kaj malavare pluraj samideanoj, sed la situacio de UEA estas ankoraŭ kriza kaj danĝera. La financa maltrankvileco en la mondo suferigis niajn kutimajn enspezojn en januaro kaj endanĝerigus la ekziston mem de UEA, se novaj multnombraj respondoj ne venos por ripari la truojn, kaŭzitajn de la falo de l' franca franko, plialtigo de poŝtelspezoj, senlaboreco en Britlando, ktp.

Ekstraktoj el leteroj:

..... La libreto kiun vi sendis al mi ŝajnis esti tre utila por varbi al la Asocio kaj mi esperas, ke ĝi helpos.

Ch. A. Fairman,
Dumviva membro de UEA.

* * *

..... Ĝi memoras al mi, ke kvankam mi estas Dumviva Membro de UEA, tamen mi ankaŭ volas pagi la kotizon de Membro-Abonanto por kiu mi enmetas la devigan ĉekon.

F-ino *M. Edith Milner,*
Dumviva Membro de UEA.

* * *

..... La legado tre impresis min kaj mi ne havas la kapablon kontraŭstari la alvokon. Ĉar mi nomas min vera internaciulo mi volas ankaŭ subteni la Internacian Asocion kaj kiel novjara rezolucio datumis mian aliĝon al Universala Esperanto-Asocio je la 1 januaro 1924. Korajn bondezirojn por la sukceso de via idealo.

Henry J. Bridges.

* * *

..... kore salutas kaj deziras al UEA bonan sukcesplenan jaron.

S-ino *N. E. Killby*, Membro-Abonanto.

* * *

..... Mi ricevis libreton pri UEA kiu plaĉis al mi. Mi sendis hodiaŭ kotizon al la sekretario en London.

W. G. Fillett.

* * *

..... Vi ja atingis vian celon, ĉar kvankam mi havas multajn pagpostulojn mi ne povis rifuzi varbiĝi. Do mi sendas al la Centra Oficejo mian kotizon. Kun ĉiuj bondeziroj

Alex. Macnab Rice.

* * *

Ĉiu motivo por subteno de UEA estas kompreneble bonega, ĉar tiu ĉi okaze la celo sanktigas la motivojn. Sed kiom da kapoj tiom da opinioj. El ĉiuj respondoj al via demandaro, tiu kiu laŭ vidpunkto pli apelaciis al mi estis tiu de F-ino Maria vam Rees; ŝia respondo estas cetere bela „multum in parvo".

Jam de kelkaj jaroj mi estas membro de via Asocio kaj abonas ĝian unikan internacian gazeton. Kial? Ĉar mi ĉiam opiniis, ke UEA kaj ĝi sole el ĉiuj esperantistaj organizaĵoj kontentigas la Zamenhofan antaŭpostulon de universala paco.

..... Se ĉe tiu ĉi punkto UEA svenus pro manko de subteno estus por Esperantismo nedirebla katastrofo kaj mi kredas, ke se ĉiu sincera Esperantisto tion klare komprenus oni ne devus dubi pri la rezultato.

Aludante nun mian abonon por 1924 mi kompreneble devas subteni laŭpove mian enlandan societon, sed mi almenaŭ fariĝos *Membro-Subtenanto* anstataŭ MA.

Henry Horseman.

..... Mi ricevis libreton; bonega eldonaĵo .....

W. Minchin.

* * *

Gratulon pri la libreto kiun vi sendis al mi. Ĝi efiku por duobligi la nombron de la membroj de UEA en 1924.

W. M. Page, Edinburgh.

* * *

Leginte hodiaŭ vian alvokon mi volonte sendas ĉi kune ĉekon de L. 4, ĉirkaŭ 100 sv. Fr. por subteni nian internacian agadon.

James L.....y.

* * *

..... Mi opinias, ke estas pli facile trovi 400 esperantistojn, kiuj fariĝus subtenantaj membroj kun jara kotizo de 25 svisaj frankoj ol serĉi 10.000 novajn membrojn, ĉar oni ĉirkaŭiros al multaj esperantistoj, almozpetante al ili por membriĝi al UEA sen rezulto. Mi ne dubas, ke la 400 esperantistoj sin prezentos baldaŭ, kaj mi estas unu. Aparte de tiu ĉi mi sendas al vi poŝtmandaton de 12.50 guldenoj (25 svis. Fr.)

Van den Brock, Leiclon.

* * *

Aliparte ni ricevis anoniman donacon de 250 svisaj frankoj de sindona amikino de UEA „memore al la grandaj oferoj de nia Majstro". Ni dankas al ĉiuj respondintoj kaj kore esperas, ke ilia ekzemplo estos sekvata. Ni atingu la 400 subtenantojn! Ĝis nun ni havas 51.

* * *

Centra Komitato de la Esperanto-Movado.

Alvoko al la Esperantistaro ekster Eŭropo.

La fondiĝo de la Centra Esperanto-Komitato kaj la Oficialaj Institucioj celas centrigi nian forton, unuigi nian laboron, starigi solidarecon inter nia rilato kaj alvoki harmonion de nia agado, tiel vigligi, pligrandigi kaj disvastigi nian movadon en la tuta mondo. La C. K. nun staras kaj funkcias. Karaj samideanoj, ni atendas vian bonvolan kunlaboron. Ni bezonas laboron unuecan, metodan kaj harmonian. Ni postulas vian helpon moralan kaj materialan. Servon reciprokan ni faru! Ĉiuj individuoj aliĝu al Universala Esperanto-Asocio (UEA). Ĉiuj naciaj societoj rilatu kun la Konstanta Reprezentantaro de Naciaj Societoj (K. R.) Monoferon donu laŭ via plej granda ebleco al la Centra Kaso. Pri laboro kaj movado en via lando nin informu de tempo al tempo. Ĉiam kun ni interrilatu, kaj librojn, gazetojn kaj presaĵojn ĉiuspecajn al ni sendu tuj post ilia apero. Dume, ni sendas al vi nian tutkoran bondeziron antaŭen rigardante kun granda espero la Atlantikan kaj la Pacifikan Oceanojn.

W. KENN,
Fakestro pri Ekster-Eŭropaj Aferoj.
Institut Franco-Chinois.
Lyon, France.

EL ORIENTA SAĜO

La filozofio de Budha

de *Won Kenn* el Kanton.

☆

Ĉio estas vana. Ĉio, kio ekzistas, estas vana. Estas vivo, estas vano; estas amo, estas vano. Nek vivo, nek morto; estas vivo, estas morto. Nek amo, nek malamo; estas amo, do estas malamo. Atentu, ke vi ne kaŭzu! Ĉar kaŭzo kaŭzas kaŭzon senfine. Kaj homa vivo estas en la universo nur momenta fenomeno, tial l' amo kaj la malamo, la ĝojo kaj la malĝojo evidente estas neniaj aliaj ol fenomenoj de fenomeno.

Tion mi skribis antaŭ nelonge pri Budhismo al unu kiun mi plej respektas. Vidante, ke mi neniel kaj neniam povas skribi pli bone kaj pli precize en alia lingvo — angla aŭ franca, mi devas nun konstati, ke la lingvo la plej taŭga kaj la plej preciza por esprimi la nean doktrinon de Budho kaj por traduki liajn librojn, estas eble la lingvo nia. Pro tio mi per la lingvo la plej taŭga kaj la plej preciza, nuntempe parolas pri Budhismo, ne kiel religio kontraŭ la krista kaj la mahometa, sed kiel filozofio orienta, filozofio de la nea skolo.

Kompare kun Kristanismo kaj Mahometismo, Budhismo ja havas malpli signifan karakteron religian, precipe en Ĉinio, kie ĝi, sub multaj transformiĝoj depost sia enkondukiĝo, jam perdas de tempo al tempo multan sian religiecon, t. e. la sencon religian. Ankoraŭ estas multaj kiuj observas ĝin kiel idolismon, sed al la klaso intelekta aŭ konscia, ĝia karaktero estas pure filozofia kaj tute nereligia. Sed nun mi parolas nur pri la ekstera parto de Budhismo, kaj forlasas la parton internan, kiu estas, laŭ la libroj, la profundo de profundo, kuŝante en la mezo de la neekzisto kaj de la ne neekzisto kaj kiun oni ne devas, eĉ ne kapablas, esprimi en vortoj, sed nur mediti per la koro.

La koncepto pri la universo.

„Reveni al la vero“. Tion ĉiam diris Budho. Sed por kompreni la veron, estas necese en la unua momento scii la substancon, la formon kaj la movadon de la universo. La substanco estas tio, kio reale estas. La formo enhavas la fenomenon de la universo, dum la movado estas, laŭ la senco, facile komprenata. Tio, kio reale estas, sin nomas „vero“ kaj ĉiu fenomeno sin nomas „principo“. La universo ekkreskis kaj kreskiĝas nur sur la bazo de „koncerno“, kiu senkomence kaj senfine, kaŭzas ĉion, kaŭzas efikon, tiel ke efiko kaŭzas ankoraŭ kaŭzon, kaj kaŭzo kaŭzas efikon senfine. Tio daŭras super la limo de tempo kaj spaco, tiel oni tute ne scias de kiam ĝi komencis kaj de kie ĝi ekkreskis. La kaŭzo estas precize la efiko, kaj la efiko, la kaŭzo. Tra la limo de tempo ĝi tute ne pliiĝas nek malpliiĝas Ĝi prezentas sur la substanco de la universo nur fenomenon.

La ondoj de la maro ekleviĝas kaj malaperas, ekkreskas kaj mortas, sed la maro estas eterne senŝanĝa. Komparante l' akvon kun la substanco, l' ondojn kun la fenomeno, kaj la ŝvelon kun la movado de la universo, oni bone komprenas, ke la substanco, la vero estas eterne konstanta; kaj estas tiu ĉi vero, kiu de la senkomenco subtenas la universon ĝis la senfino. La vero, la substanco, estas do absoluta, konstanta, senlima kaj unika, dum la fenomeno kiu sin prezentas sur la substanco estas relativa, varia kaj plura.

Ĉiu fenomeno reale ne ekzistas; ĝi estas kun la neekzisto de „mi“. Ne estas unu „mi“ kiu kreas, kiu estas majstro de ĉio; ĉar ĉio devenas nur de „koncerno“, de „koncerno“ de la kvar elementoj, la tero, la akvo, la fajro kaj la vento. La „mi“ estas nur momenta fenomeno rezultita de la koncerno. Ĝi tute ne ekzistas; ĝia korpo, kiam bruligita fariĝos cindro kaj de cindro ĝi fariĝos alia laŭ diversa koncerno, diversa kaŭzo kaj efiko. Ne nur la „mi“, sed ankaŭ ĉio en la universo estas fenomeno, rezultita de koncerno de kaŭzo kaj efiko. Prenu lignon kaj segilon. Oni povas fari per ili seĝon, tablon aŭ liton. La „koncerno“ estas tute sama, sed nur per la koncerno de tablo oni faras liton. Do, la vario kaj la transformiĝo de ĉiu fenomeno en la universo estas nur rezultato de diversa „koncerno“. Vere ekzistas en la universo nur reciproka kaŭzo kaj efiko, kaj de tio sin produktas ĉiuj vivaĵoj, ĉiuj estaĵoj, ĉiuj aferoj, ktp. ktp.

Ĝenerale ĉiu fenomeno vivadas sub kvar transformiĝoj: la ekkresko, la resto, la ŝanĝo kaj la malapero, ĉar la fenomeno estas neniam konstanta. Tiun principon oni povas apliki al la homa vivo: la naskiĝo, la forto, la malsano kaj la morto. Ĝi ankaŭ similas la kvar sezonojn: la printempo, la somero, la aŭtuno kaj la vintro. Kiam ĝi malaperas, ĝi rekreskas, tiel la fenomeno estas ĉiam transformiĝanta. La homo, la besto, l' arbo estas do unu el la ĉiuj fenomenoj, dum la juneco, la maljuneco, la vivo, la morto, l' amo, la malamo, la sukceso, la feliĉo, la heroaĵo ktp. ktp. estas nur momenta apero dum la transformiĝo de la fenomeno. Sed fenomeno kaj fenomeno kuniĝas; la kuniĝo kaŭzas alian fenomenon kaj tiu ĉi alia fenomeno kaŭzas ankoraŭ fenomenon, tiel ke tra la universo estas nur „koncerno“, kaj kaŭzo kaj efiko, kiu estas la esenco de la evoluado de la universo. La legantoj pli bone komprenos la ideon legante la jenajn frazojn de fama budhano: „Ni kredas ke, tra la limo de tempo kaj spaco, estas konstanta lumo, kiu reale ekzistas kaj estas la substanco de la universo. Ni kredas, ke la movado de la substanco fariĝas la fenomeno de la universo, kaj pro la senfina daŭriĝo de koncerno reciproka, sin prezentas la diversa aspekto de la fenomeno.“

La morala koncepto.

Kio estas boneco? Boneco estas nur agado konforma al la leĝo de la universo. Kontraŭe, tio signifas malbonecon kiam ĝi estas kontraŭ la leĝo natura. La universo estas granda unuo; ĉio natura estas prava, ĉar la movado de la universo estas ĉial kaj ĉiel la elmontro de la praveco; sekve tio kontraŭ la naturo estas malprava, tial malbona Kiel antaŭdirita la substanco, la formo kaj la movado fariĝis la vera enhavo de la universo, — la triunuo budhista, tial l' homaro ankaŭ vivadas kaj evoluadas triunue. Sur l' homo (la substanco) pro diversa koncerno kaj diversa kaŭzo sin prezentas la fratoj, la patro kaj filo kaj la edzo kaj edzino (la fenomeno) konsekvence ekzistas la movado de frateco, fileco kaj amo. Tio estas tute natura, konforma al la natura lego. Male, se oni agas kontraŭ la frateco, kontraŭ la fileco aŭ kontraŭ l' amo, tio tuj signifas malpravecon aŭ malbonecon, ĉar ĝi estas kontraŭnatura. Do, vera moralo restas en la rondo de naturo, kaj naturo estas vero estas boneco.

La triunuo estas ankaŭ nomata „la tri trezoroj", al kiuj oni nepre devas reveni. Budho estas la unua tresoro, religio aŭ principo la dua kaj monaĥo la tria. Tio ankaŭ reflektas la substancon, la formon kaj la movadon de la universo, ĉar kiam oni jam kredas en la movado, t. e. en la monaĥo kiu propagandas la religion, oni ja povas kompreni la principon, kaj kiam oni jam komprenas la principon, oni ja povas reveni al Budho kiu mem estas la vero. Sed oni devas ĵuri 1e malbonaĵojn ne fari; 2e fari bonaĵojn kaj 3e fari bonaĵojn por ĉiuj aliaj, ĉar estas ĉi tiu lasta ĵuro, „sin oferi por la bono de aliaj", la supera moralo budhista.

La antaŭdirita estas tio, kion oni nomas „morala principo". Estas ankaŭ dek ordonoj budhistaj, el kiuj tri rilatas la korpon, kvar la buŝon kaj tri la senton. La ordonoj al ni vokas unue ne mortigu, due ne ŝtelu, trie ne diboĉu, kvare ne mensogu, kvine ne babilemu malserioze, sese ne insultu, sepe ne perfidu, oke ne avidu, naŭe ne koleru, kaj deke ne malsaĝu. Ankaŭ, kiel filo ni multe ŝuldas al niaj gepatroj, kiel civitano ni multe ŝuldas al la regnestro, kiel individuo ni multe ŝuldas al la homaro, kaj kiel vivaĵo ni multe ŝuldas al la triunuo budhista, tial al niaj gepatroj, al la regnestro, al la homaro kaj al la triunuo budhista ni devas multe repagi pro ilia bonfaraĵo.

Por la praktika adeptado de la moralo budhista oni devas sin okupi je ses agadoj por alveni al „la lando konscienca kaj lumiga", unue donaci, due abstinenci, trie toleri, kvare diligenti, kvine mediti kaj sese prudenti. Tiuj ses agadoj sin grupigas sub tri ĉefvirtoj, l' amo, la kuraĝo kaj la saĝeco, kontraŭ la tri malvirtecoj de la sento, la avido, la kolero kaj la malsaĝeco, kiuj produktas ĉiujn malbonaĵojn. Ĉiu budhano devas submetiĝi serioze al la ses agadoj. La donacado estas unu el la plej gravaj. Ĉar la suno donacas senĉese lumon kaj varmon, akvo donacas fluon, la movado de la universo estas pluparte reciproka donacado, tial homo devas obei al tia natura leĝo kaj donaci. Donacado estas ĉu materia, ĉu spirita. Materie oni donas al alia ĉion necesan, spirite li helpas lin al la lando de konscienco. Por purigi sian korpon kaj spiriton ĉiu monaĥo restas dumvive senedza kaj manĝas vegetare. Abstinenco estas do necesa. Tolerado signifas jene: 1e konstanta obeo kaj estimo al la gepatroj kaj triunuo budhista; 2e baton kaj riproĉon de aliaj akcepti senkolere kaj senĝeme; 3e fronti kontraŭ la varmo, la malvarmo, la vento, la pluvo, la soifo, la malsato, la maljuneco, la malsano, la morto ktp. kaj 4e sin deteni je ĉiu emocio: kolero, malĝojo, malgajo, volupto ktp. Diligento signifas antaŭenmarŝon kuraĝigan. Por bone kompreni la vivon kaj la morton, por trapasi trankvile la pordojn de vivo kaj morto kaj por forigi la ĝojon kaj la malĝojon pri vivo kaj morto kuraĝiga antaŭenmarŝo estas nepre necesa. Ĉiu budhano sidas ĉiutage kun kruroj krucaj unu sur la alia kaj silente kaj profunde meditas. La meditado forigas ĉiujn malpurajn ideojn kaj centrigas la penson al la konscienco. Tio estas nepre necesa, ĉar diris Budho „trankvileco produktas saĝecon", kaj saĝeco estas la fonto de ĉio bona. Tio estas la tri virtoj kaj la ses agadoj. Ĝi montriĝas jene:

La tri virtoj.				La tri malvirtoj.
amo	donaco		avido kaj avaro	avido
	abstinenco	. . .	diboĉo	
kuraĝo	tolero	kontraŭ	kolero	kolero
	diligento	„	maldiligento	
saĝeco	medito	. . . . .	konfuzo	malsaĝeco
	prudento	. .	malprudento	

La celo de la vivo.

Sur la ondaro de tempo sin movadas kaj variadas ĉiu fenomeno de la universo. Estas ĉarma belulino. Sed post nur momento restas nur kadavro sub la tombo. Floroj floras printempe, sed kio restos en aŭtuno? Lando iam fariĝis maro, kaj maro iam malaperas. La ruino kiun neniu atentas hodiaŭ, estis eble granda kastelo kaj ĉarma palaco; kaj bela lando pri kiu regnestro kaj generaloj fieras hodiaŭ, eble estos en la baldaŭa morgaŭo la ĝusta lando pri kiu, por kiu kaj sur kiu nur poetoj ploros kaj korvoj krios. Oni vidas kiom mallonga homa vivo estas. Ne nur la „mi", sed ankaŭ ĉio, eĉ la mondo ŝanĝiĝos. Tiel estas la universa fenomeno! Sed ne timu. La ŝanĝiĝo novan vivon kreos. Kiam mortis la printempo dum la vintro, printempo kreskiĝas. Ondo pasas, ondo sekvas; ondo malaperas kaj ondo leviĝas. La ondaro de la vivo neniam ĉesas. Nur ni ne rigardu la mondan vivon kiel vivon realan. Ĝi estas nur momenta. Ni devas ĉiam antaŭenrigardi la lastan celon de nia vivo.

La lasta celo de nia vivo estas, ke ni devas ĉiuj „nipani". „Nipano", laŭ la vulgara senco, povas signifi „morto", sed laŭ la vera senco budhista ĝi estas tute alia. Krom signifi „emancipon", t. e. emancipo je la vulgara, monda afero, ĝi ankaŭ posedas la sencon „vivadi super vivo kaj morto", kaj estas la lando de „nipano" kie estas Budho. Nipano estas la substanco laŭ antaŭdirito kaj vivo kaj morto la fenomeno. Sur la maro de nipano aperas nur ondoj de vivo kaj morto, sed kiam la suno ridetas kaj vento ĉesiĝas, la maro montras sian realan vizaĝon, prezentante spegulon de beleco kaj trankvileco. Tie kuŝas la vero kaj estas la lando de neekzisto kaj ne neekzisto. Estas ankaŭ la lando de vera feliĉo, kiu nek feliĉigas nek dolorigas, kaj ankaŭ la lando konstanta, libera, serena kaj purega. Ne nur la homo, sed ankaŭ ĉiu vivaĵo, ĉiu estaĵo, vegetaĵo, mineralo, eĉ atomo devas nipani. Ĉiu vivaĵo havas budhecon, t. e. la substancon de Budho. Nur pro diversa koncerno kaj diversa kaŭzo ni nin prezentas sub la fenomeno de homo, besto, vegetaĵo, ktp. Sed estas koro, estas Budho. Ni povas tuj fariĝi Budho se ni decidas. Diras ĉiam la libro: „Vi estas Budho estonta kaj mi estas Budho estanta". Ĉiuj havas budhecon. Ĉiuj nipanu kaj ĉiuj fariĝu Budho! Jen la celo budhista.

*

Rimarko de la Redakcio. — *Baldaŭ ni presigos novan artikolon de nia ĉina kunlaboranto S-ro Kenn, pri Konfucio kaj Konfucianismo. Estas memkompreneble, ke tiaj artikoloj neniel ligas la redakcion kun iu aŭ alia ideo religia aŭ filozofia, sed nur emas, laŭ la deziro mem de D-ro Zamenhof, helpi la diversgentajn homojn pli bone koni unu la aliajn kun siaj grandaj tradicioj kaj ankaŭ kun sia aparta originaleco en stilo kaj esprima maniero.*

ORIENTO KAJ OKCIDENTO

ADIAŬO DE JAPANA ARTISTO AL EŬROPO.

Ni ricevis la jenan, belan leteron de nia konata samideano *Narita*, ĵus forlasanta Eŭropon kaj esprimanta sian orientanan vidpunkton. *(Noto de la Red.)*

Adiaŭ, Okcidentaj Amikoj!

Donate la okazo forlasi la Eŭropon, pro la sisma kataklismo de Japanujo, mi deziras esprimi al niaj Okcidentaj Amikoj la plej sincerajn kaj korajn salutojn.

En antikva tempo la mondo havis kvar originojn de diversaj civilizacioj: unue, en Egipto; due, en Babilono; trie, en Hindujo, kaj fine en Ĥinujo. En tiu tempo, la civilizacio ĉiam kreskis proksime de l' akvo, kiu permesis al tiuj landoj la facilecon de komunikado kun aliaj, aŭ por komenco aŭ por milito. Post tiuj kvar landoj alvenas Grekujo, por doni al Eŭropo la bazon de l' okcidenta civilizacio. Depost greka epoko oni vidis la konkretan starigon de l' okcidentaj civilizacioj kiuj grandiĝis en diversaj landoj de Eŭropo ĝis nuna tempo.

Tiamaniere civilizacio sekvis civilizacion unu post alia. La ruino de unu civilizacio servis al la alia fondon de nova civilizacio. Historio rakontas kun vero, ke nenia civilizacio estos kompleta, prezentante al la mondo nur unu fazon de la civilizacio; la sekvonta civilizacio estos ĉiam la sintezo de antaŭaj civilizacioj, ĉar neniu civilizacio ĝisnuna povis sin liberigi de la ruino. Ho, ve! Gloro de Salomono valoras malpli ol unu peceton de lilio en kampo. Kiu povas pretendi, ke ni havus ĉion de trezoroj de antikvaj civilizacioj? Nur ruino! Tiu leĝo de universo ĉiam regas mondon. Tio estas notinda fakto en historio.

* * *

En antikva tempo, komerco ĉiam kreskis en la mondo tute kiel la milito, kaj komerca prospero ĉiam sekvis la progreson de la homa civilizacio. Okcidento kaj Oriento estis ĉiam ligitaj per komerco; tiam komerco signifis *komunikadon de spirito* inter la landoj interesitaj. Kaj homoj amis vojaĝon tre volonte, tiam turismo havis la nomon de *pilgrimo*. Homoj estis pli seriozaj kaj pli piaj en malnovaj tempoj.

En Grekujo, patrino de l' eŭropa civilizacio, sporto ĉiam interesis multajn, kaj en la festo de Olimpiado, laŭrokrono ĉiam gloris laŭreatojn. Tiam sporto havis grandan rolon por grekoj doni okazon admiri la belecon de korpo, same kiel doni okazon preparadi por la milito. Kaj ĉiam politikistoj estis arogantaj montrante en si grandan oratoron. Politiko ĉiam donis la ŝajnon de triumfo momenta. En la praktika vivado politiko ĉiam kovris la gloron de artoj kaj sciencoj. Ĉar, politikisto mensogas, politikisto minacas, politikisto ekzekutas! Forto estas al li, povo estas al li. Ah! li povos praktiki ĉion, kion li volas. Nur la mondo malgraŭ ĉio restos libera, egala kaj kritika en la daŭro de longa vivado. Historio ĉiam elokvente rakontas la fakton: neniu politikisto finfine konvinkis la mondon; neniu tirano povis eviti la supran leĝon de l' universo, pereiĝo! Ho, ruino, kia estas via forto, vi sola estas la tirano absoluta! Neniu kreskaĵo sen pereiĝo! Neniu agado sen pereiĝo!

— Do, mizerulo forĵetu ĉian malbonan volon! admonas Budhismo, ni vidos nirvanon!

Havi estas perdi. Havi ĉion, estas havi nenion. Havi nenion, estes havi ĉion. Ah! Ĉio estas nenio, kaj nenio estas ĉio en tiu ĉi mondo.

Kion povus signifi Jesuo antaŭ Cezaro? Cezarismo facile povus ekzekuti unu Jesuon! Sed animo de unu Jesuo, ĉiam restos kiel la stelo de frumateno. Libereco de animo kaj sendependeco de spirito neniam pereos.

— Se iu frapas vian dekstran vangon, donu al li la maldekstran!

Ho, ve! tiu spirito de Kristanismo jam delonge forlasis Okcidenton; okcidentaj kristanoj bataladis kaj buĉadis kvin jarojn kaj batalados ankoraŭ... Jam materialismo putrigis okcidentan mondon delonge, kaj gloro de diplomatio estis mizero de popolo. Kie troviĝas amo? Kie troviĝas justeco? Eble amo kaj justeco povos troviĝi en la tombejo de soldatoj pereintaj nekonite.

Dormu, dormu homaro! por ke vi povu revekiĝi pli forte, kun fortego nova. Venos unu tago, kiam amo kaj justeco revekiĝos en vi! Ho, homaro!

* * *

Homaro dormu, dormu ĝis kiam la absoluta leĝo de l' universo, ridetos sur vi. Ne rigardu la restaĵon de ruino de malnovaj civilizacioj, dume nur iuj revivigos staton de malnovaj civilizacioj en la muzeo aŭ en la historio. Certe, grandaj artistoj rakontos la belan, superan vivon internan de grekoj. Homero kantos, Platono admonos, Aristoto analizos, Fidiaso ridetos post la mirinda templo, Praksitelo kaj Lisipo montros la belecon de nuda korpo.

Kaj demandu al tiuj grandaj grekoj kie estas nun la riĉaĵo de komerco kaj gloro de sporto, kaj prospero de turismo de tiu tempo!

Nenio, nenio! nenio regas mondon. Tempo jam malaperigis tiujn progresojn. Nur Herodoto rakontas ĉion malĝoje en sia historio. Ah! Regas mondon homan tiu absoluta leĝo de l' universa pereiĝo! Ernest Renan en sia verko „Souvenirs d' enfants et de jeunesse“ preĝis sur unu akropolo rigardante la pereiĝon de antikva Grekujo! Li sopiris kun ĝemo pri manko de poezio! tio estis la esenca kulpo de greko, rezonanto; li admiris la humanan civilizacion de grekoj, sed tio estis tro malfrua por li, kiu preĝis frapite sur la akropolo kun la certigo de Budho: nenio daŭras, ĉio nur momente. Ni preĝu kun Blaise Pascal, feliĉon kunesti kun Dio. Tien volis ankaŭ alveni en siaj lastaj tagoj Zamenhof, aŭtoro de Esperanto. Post la morto de Zamenhof kion faris Esperanto? Kie troviĝas la spirito de „Vivo de Zamenhof“, admire verkita per nia granda aŭtoro D-ro Privat? Ĉu tiu spirito jam pereiĝis laŭ la leĝo de l' universo aŭ evoluis laŭ la leĝo de la reakcio?

Vivu! amo kaj justeco vekiĝontaj en homaro! Vivu en Esperantujo, vero kaj poezio!

Paris, la 14 decembro 1923.

Ŝigeo Narita.

BELARTA PAĜO

Trovo de unu „Giorgione“.

De *H. Moser.*

El Londono venas sciigo pri certa trovaĵo el la tempo de la renesanco, kiu ĝoje ekcitos artistojn kaj artamantojn.

Temas pri eltrovo de forgesita pentraĵo de l' mondfama bildo „Il Concerto“ de Giorgione Barabelli (1477—1510), nomita en la artmondo „Giorgione del Castelfranco“ aŭ nur „Giorgione“.

Sub la nomo „Concerto del Giorgione“ ĝis nun oni komprenis bildon kun tri viroj, videbla en la pentraĵgalerio de l' palaco Pitti en Firenze, Italujo.

La nove eltrovita „Concerto“ devenas, kiel estas konstatite laŭ pruvoj, el la fama kolekto de l' duko Henriko d' Orléans, posta reĝo de Francujo kaj edzo de Katarino de' Medici. Sesfoje la bildo ŝanĝis sian posedanton. Antaŭ 150 jaroj ĝi troviĝis en la pentraĵaro de Earl of Kinnoull en la kastelo Dupplin en Skotlando.

En la jaro 1842 okaze de aŭkcio de Christie's ĝi estis vendita en Londono je prezo pli alta ol por bildo de Tiziano. La antaŭlasta posedanto estis negocisto nekapabla ĝin taksi.

Profundaj laŭdokumentaj esploroj de l' hodiaŭa posedanto *profesoro Otto Migge en Londono*, faritaj precipe en la biblioteko de la Brita Muzeo, klare nun difinas la identecon de la tri personoj en la „Concerto“.

La ĉefa figuro meze de l' bildo estas la kardinalo Alessandro Farnese, 26-jara, ludanta kordpianon; dekstre kun liuto staras kardinalo Giovanni de' Medici en la aĝo de 19 jaroj; la tria, la plej juna, nur 17-jara, estas Giorgione mem.

Vasari rakontas, ke Giorgione pro sia vere dia kantado kaj liutludado estis glore konata en plej altaj sociaj rondoj. Lia ĉeesto en la bildo, apud kardinaloj, tion konfirmas.

Eble oni miras pro la juneco de la supre cititaj kardinaloj, sed oni ne forgesu, ke dum tiuj tempoj, dank' al amikeco kun tiamaj papoj, kelkaj altranguloj post faritaj riĉaj donacoj sukcesis nomigi siajn filojn al tia digneco jam en tre juna aĝo.

Giorgione komencis labori al „Concerto“ en 1494; oni ne scias ekzakte, kiam li ĝin finis, sed prokrastoj en la verko estas tre verŝajnaj pro lia daŭra okupado pri freskopentraĵoj.

Laŭ aserto de l' nuntempa posedanto, profesoro Migge, *la londona bildo estas la originalo* kaj estis pentrita de Giorgione por la kardinalo Alessandro Farnese; la alia bildo en la palaco Pitti en Firenze, kopio de l' unua sendube, por Giovanni de Medici.

La du kardinaloj estas en la bildo facile rekoneblaj laŭ diversaj aliaj pentraĵoj de Raffaello kaj el bildoj de papoj. (Alessandro Farnese poste iĝis papo Paŭlo III-a, Giovanni de' Medici iĝis papo Leo X-a).

El bildo en Budapest, pentrita de Raffaello, prezentanta belan junan viron kun virinecaj trajtoj kaj el aliaj pentraĵoj de Giorgione mem kaj de Tiziano oni povas konstati kun certeco, ke la plej juna viro en la „Concerto“ estas Giorgione, *ne* virino, kiel oni opiniis, kiam oni ne pli konis la identecon de la tri figuroj.

La artokritikistoj konstatas, ke Giorgione estas la aŭtoro de la Firenza bildo „Concerto“. Post 1880 Morelli esprimiĝis akre: „Bedaŭre la pentraĵo tiom estas surŝmirita, ke en ĝia nuna stato nur malmulte de l' originalo estas ankoraŭ rekonebla“.

En tute alia imense pli bona stato troviĝas la Londona bildo: post 450 jaroj ĝi estas ankoraŭ originala, neniam surpentrita aŭ surŝmirita; la supraĵo prezentiĝas iomete vualita, ĉar neniam la bildo estas purigita, je ĝia certa utilo. La originala lazurilo tegas ankoraŭ la tutan bildon, el la antikva fundo lumas la nekomparebla ĉarmo de Giorgionaj koloroj.

Laŭ ĉio tio la Londona „Concerto“ estas do la sola de Giorgione kreita verko ne surpentrita.

Ĉi tiu grandega avantaĝo samtempe kun la dokumente pruvitaj konstatoj de la nuna posedanto kaj la fakto, ke pentraĵoj de Giorgione ne plu estas aĉeteblaj, ke la Firenza „Concerto“ ne plu povas esti konsiderata kiel originala laboro, ĉar tro terure ĝi estas surŝmirita de nelertaj posteuloj, *ĉio tio aldonas al la Londona eltrovo netakseblan valoron kaj la tuta artama mondo vere povas ĝoji pri ĉi tiu artotrezoro, pri ĉi tiu eltrovita, vera, unua kaj unika „Concerto della musica“.*

Trad. H. Fridöri.

Novajn templojn por la venonta epoko!

De *Serge Withman.*

Tra la tuta mondo nun estas aŭdeblaj heroldaj voĉoj de l' estonto. La homaro ilin kaptadas kaj ĉie ili sonas, kiel majesta ĥoro. Super la ĥaoso iĝis aŭdebla voĉo de homa spirito, postulanta la sanktigon de beleco kaj liberigon de l' mondo per arto. Novaj temploj de adorado estas serĉataj tie kie la kreaĵo prononcas novan Anunciacion de l' paco kaj amo.

Kaj post kiam la postulo de l' estonto estos prononcita, ĝin oni plu ne povos nei.

Responde al tiu alvoko, la „Majstro-Instituto de l' Unuigitaj Artoj“ kaj „Corona Mundi“ (Krono de l' mondo) sciigas la fondon de l' muzeo je l' nomo de Roerich, kiel donacon al la popolo. La muzeo, kiu enhavos kelkcentojn da pentraĵoj, estas fondita la 17 novembro 1923, kaj estos malfermota por la publiko la 24 marto 1924.

Ĉar pli ol kvaronon de jarcento la pentraĵoj de Roerich portadis sian lumon al ĉiuj popoloj. En Ameriko, pere de ekspozicioj, ili fariĝis konataj en ĉiu parto de tiu lando. Dum tiu tempo elkreskis la konscio, ke pere de Nikolao Roerich la nuna jarcento trovis sian superan voĉon kaj ke liaj laboroj egalas la plej grandajn profetaĵojn de ĉiuj epokoj. Kun tia taksado tie naskiĝis bezono fondi centron, kie ĉiuj homoj povus havi konstantan aliron al instruoj de tiu majstro. Kaj kiel reprezentantoj de l' popolo la ambaŭ institutoj deziras eternigi tiun monumenton, por ke ĉiuj homoj povu partopreni ĝian belecon kaj saĝon.

En sia arto Roerich simbolis evoluon de homa spirito.

Li igis senmorta la vojon, kiu kondukas de idolana tero supren al Malfermitaj Pordegoj kaj al Ponto de l' Gloro. Kaj fine venas lia apokalipsa vorto — la malkaŝo de l' Granda Miraklo. Nome en Ameriko li malkaŝis la efektivigon de legendo de la veno de Mesio.

Do, ne hazardo estas, ke tiu muzeo estos aranĝita en Ameriko: la popolo repagas sian ŝuldon al tiu, kiu unu el unuaj staris sur ĝia flanko. Antaŭ dudek jaroj nome Roerich deklaris al Eŭropo sian kredon al amerika kreestonto kaj ree li atestas sian kredon je ĝi. Precipe konvenas ankaŭ, ke tiu donaco venu pere de Majstro-Instituto de l' Unuigitaj Artoj kaj „Corona Mundi“ ĉar ambaŭ institucioj ŝuldas sian ekziston al influo de Nikolao Roerich. Estis li, kiu komprenis la idealon de lernejo, kiu sub la sama tegmento kunigas ĉiujn artobranĉojn; estis li, kiu ellaboris la planon de internacia arto-centro, kiu meze de popolo disvastigos la amon al beleco kaj estos la peranto inter artisto kaj publiko. Kaj el la skribaĵoj de tiu ĉion ampleksanta persono la ambaŭ institutoj ĉerpas la principojn de sia kredo.

La fondo de tiu muzeo eĉ pli multe signifas ol nur monumento al alta spirito, kiu lumigas la vojon de sia generacio. Ĉitiutage ĝi estas sendube ankaŭ — profunda simbolo, esprimanta la profetaĵon pri la estonta amikiĝo de Ameriko kun la renovigota Ruslando.

Kaj krom tio ankoraŭ devas esti konfesata la internacia senco de tiu okazintaĵo. La ekzisto en Ameriko de monumento al tiu granda rusa antaŭvidulo ĉiam estos la pruvo de l' grava misio de arto. Roerich jam plu ne apartenas al unu popolo, sed — al la tuta mondo; antaŭ liaj kreaĵoj, kiuj ekzistas por ĉiuj homoj kaj epokoj povas kliniĝi kiel unuo — la limoj de morto kaj la homaro.

Ĝi staru kiel templo de l' estonto!

Ĉar tie beleco kaj amo unuigas ĉiujn homojn de l' mondo, por la venonta epoko!

Trad. *Edgaro Grot*, Riga.

PENSOJ PRI LA VIVO

Agoforto kaj Rapido

de *Nikolao Roerich.*

Mi estas feliĉa, havante la eblecon, antaŭ mia forveturo Orienton, min turni al eŭropa gejunularo, kiu tiel plenfervore luktas por antaŭen- kaj suprenleviĝi. Tamen en ĉi tiu entuziasmo la gejunularo devas diferenci la rapidon, kiu konsumas ĝiajn fortojn, de la efektive krea agoforto. Estas sciate, ke foje Akbar-la-granda desegnis linion kaj postulis de la saĝulo Birbal, ke tiu mallongigu la linion, sen detranĉi aŭ deviŝi. La saĝulo desegnis pli longan linion paralele al tiu kaj la linio de Akbar estis mallongigita per tio. La saĝeco konsistas el tio desegni pli longan linion.

Kiam en niaj tagoj oni observas la diigon de rapidego, kelkfoje ni nin sentas senhelpaj iri renkonten al tiu tumulto, al tiu senutila malŝparo de fortoj kaj eblecoj. Kaj nur se ni prezentas pli longan linion de efektiva agoforto, ni povas malpliigi la bolantan ondon de l' nuntempo — la mezuron de rapido.

Nature, ni devas scii: mallaŭto agas, parolo donas impulson por ago. Mallaŭto devigas, parolo konvinkas. Nemezureblaj kaj neesploreblaj internaj okazoj de l' mondo pasas en bruplena kaj erariga supraĵo de sonoj. Plej grandaj sinstreĉoj povas esti farataj senspire; ju pli rapida la spiro, des pli granda la foruzo de forto. Kiu dum ago kapablas ĉesi spiri — kompreneble libervole — estas la majstro de mondenergio, de energio, kiu tra la universo agas kaj kreas.

Sed ekzistas du specoj da senbruo — la senespera mallaŭto de mallaboremo, kiu signifas disigon kaj la senbruo de sola certeco, kiu prezentas harmonion de l' vivo. La regata senbruo estas mallaŭto de reganto. Ju pli perfekta la trankvilo, des pli granda la potenco, des pli granda la agoforto.

Dum simila trankvilo venas vera scio. Pensoj de homo estas miksaĵo de vera kaj falsa. Veraj komprenaĵoj estas difektitaj pere de falsaj komprenoj; vera imagoforto estas kripligta pere de falsa; vera memorkapablo nubigita pere de falsa memoremo. Supra spirita agado devas ĉesi kaj mallaŭto devas sekvi la senripozemon — tiam en simila trankvilo, dum tia trankviloplena mallaŭto ekestos spirita tralumo. Kaj vera scio fariĝos la senerara fonto de ĝusta agado.

Ĉi tiu vera agoforto sin malkaŝas nevidebla en ĝiaj rezultoj por la rapideganta mondo. Kaj pere de tiuj rezultoj oni vidas per homaj okuloj, kiome pli longa estas la linio de agoforto, kompare kun la linio de rapidego.

Kaj tago de rapidego estas malamiko (nokto) de agoforto. Ĉar nenio estas kreata per rapidego; eble nur mono. Sed en historio estas nur Cresus, aludata pro lia riĉeco kaj ankaŭ li mizere finis sian vivon.

Esti kapabla elmontri agoforton dum rapidego, esti kapabla por silento, por lumplena pasiveco — signifas esti taŭga por senmorteco. La senago de ĉi-tiu forto kreas, gardas kaj disigas. Tia agado estas moviga forto same kiel senpera mirinda movoforto de naturelemento.

Eĉ la plej rapidege sin turnanta rado ŝajnas esti senmova. La harmonio de superega agoforto ne povas esti perceptata de homa okulo, nur ĝiaj rezultoj fariĝas rimarkeblaj.

Efektiva mallaŭto estas iufoje tegita (kovritra) de ia krispitaĵo de babilo kaj iom da agoforto ekstere — same kiel oceano kun sia vivplena ondosupraĵo. Sed ĝi havas nenion komunan kun rapidago. Rapido havas siajn proprajn rimarkojn, ĝi ĉiam estas akompanata de vulgareco. En rapidego vi trovos ĉiujn specojn de tiu fi-malsano de moderna homaro. Kion serĉas la plej bonaj elementoj de l' homaro? Kial disvastiĝis revolucioj, sangaj revolucioj kaj aspiroj al perfekteco.

La homara spirito luktas en ĉiuj similaj bataloj kontraŭ la vulgarismo. Kiam popolo fariĝas fi-amaso, kio okazas? Tiam disvastiĝas malluma reĝolando de vulgarismo. La popolamaso rapidegas al pordegoj de vulgarismo. Same malbelan transformiĝon de popolo en fiamason oni povas observi dum la rapidego, vendante kaj la kuregoal lokoj de akcidentoj. Saman rapidon ni ofte diferencas en muziko, en koloroj, en desegnitaj linioj, en ritmoj de skulptaĵo.

Ĉu vi eble demandos pri psikologia signifo de ĉio ĉi? Ĉiu konas la psikologian signifon, se kreskas la dirita paroksismo. Unu aspekto de rapidego estas neevitebla. La esprimo de ĉiu okulo sin ŝanĝas. Dum la malklaraj plenumoj, kiuj okazas rapidege, neniam oni rimarkas feliĉajn vizaĝojn. La rapidego febre postulas: „iru, iru“, kaj ĉio, kio obeas al tiu ordono, forrapidegos; sed la ŝildo de agoforto signifas: „venu, venu“, kaj ĉiu, kiu sekvas al tiu voko, proksimiĝas al la multaj eblecoj de l' vivo. La homoj estas tre okupitaj. Ili ne povas atendi animan interligon, kaj en ĉiu momento povas tiel multe okazi. La plej bonkora publiko estas kapabla transformiĝi en fi-amaŝon kiu forgesis ĉiun diferenckapablon, plena de plej sovaĝaj instinktoj. Ekzistas multaj klarigoj de ĉi tiuj momentoj, sed unu el la plej bonaj estas tiu, ke la vulgareco subite ekregas. La regno de tiu mistera potenco estas granda. Estas tiu sama vulgareco, kiu la amason faras sovaĝa kaj orumas la malverajn kadrojn, la himnojn al „Jazz“ malsuprenŝiras; tiu sama kiu korpan forton transformigas en kruelaĵojn, tiu sama, kiu sin elmontras en supermezuro de supraĵa vivo. Eĉ la lipoj estas koloritaj per ĝi.

Estas kvazaŭ aperus besto el sub haŭto de homo senhaŭtiĝanta. Sed tutegale, prenu la homojn, kiaj ili estas de naturo. Forigu nur la rapidegon el ilia vivo, kaj aperos la efektiva homo. Kvazaŭ ĉe kemia solvaĵo. Per same scienca maniero la homaro disigu rapidegon de agoforto.

„Ĉiuj formoj de tiraneco komenciĝas per afableco“, estas plej vera proverbo. „Ĉiuj formoj de vulgareco komenciĝas el kompromisoj.“ Unutage oni faras la plej etan kompromison, iun alian tagon unu malpli etan kaj jam plej baldaŭ per tio estas fondata pastreco de vulgarismo.

Estas nenia komunloko, nenia memkompreneblo. Ni ĝin nun devas ekzerci, ĉar multe da efektiva agoforto, multe da diferenckapablo necesaj estos en plej proksima estonto. Kaj ĉe ĉiu movo homoj devas scipovi diferenci, kie la vulgara rapidego, kaj kie la eterna agoforta troviĝas.

Ni ĉiam devas esti praktikaj. Ĉu konstanta tienmontro heligos la mallumon? Alportu nur lumon, kaj la mallumo kvazaŭ neniam ekzistis.

Neado, kritiko, senkuraĝigo nenion helpos. Sed ekzistas la plej unua ebleco, la linion de rapidego mallongigi pere de rezultoj de pli longa linio de agoforto. Lasu nur veni la rezultojn! Aŭ: la rezultoj montros kaj pravigos.

Neniam vi povos la vulgarismon venki pere de la potenco de malbelo.

Potencon de beleco sekvas venko. Nur beleco vere kapablas subigi la vulgarismon kaj haltigi la sovaĝan rapidegon apud la pordegoj de tiu falsa orumita regno. Kaj la venko estas proksima. Ĉio kion iufoje ni „falinta“ nomis, ĉu ĝi ankaŭ ne „leviĝis“?

Trad. *Edg. Grot*, Riga.

SOCIA VIVO

La mirindaj entreprenoj de Ford.

En la decembra numero aperis ekstrakto el la interesega libro de Ford: „Mia vivo kaj verko". Kurioza koincido, ke S-ro Archdeacon samtempe estis skribinta la ĉi suban artikolon pri tiu genia inĝeniero, fariĝinta la plej riĉa viro en la mondo, sen spekulacio, nur dank' al sia talento, kaj el kies iniciato oni povas elĉerpi tre utilajn instruojn.
La ĉefaj dokumentoj pri tiu artikolo estas ĉerpitaj el franca revuo „LA NATURE".

Ekzistas, en Usono, fervoja linio, nomita „The Detroit Ironton and Toledo Railroad", kies ekspluatado estis, iam, tute malprospera kaj deficita. La financa situacio estis tiel malbona, ke, kiam iu banko anoncis, ke ĝi havis aĉetantojn po 60 % por la akcioj, 98 % el la akciuloj tuj cedis siajn akciojn, feliĉaj esti trovintaj tiun tute neesperitan prezon. La aĉetantoj estis Ford kaj lia filo.

Tuj post la komenco de la ekspluatado, ili prenis multajn decidojn kiuj surprizegis ĉiujn fervojajn specialistojn.

Ford tuj kreskigis la salajrojn po 20 % (ses dolaroj minimume) kaj samtempe malpliigis po 20 % ĉiujn tarifojn.

La paradoksa rezultato estis la jena:

La ekspluatadaj elspezoj estis 118 % en Junio 1920, sub la Forda ekspluatado en 1921 ili malkreskis ĝis 53 %, tiamaniere ke li ne plu perdis monon, sed kontraŭe gajnis.

Kiel do oni povis atingi tiajn rezultatojn?

Unue, oni forsendis la tutan antaŭan estraron, kaj anstataŭis ĝin per direktoroj de la aŭtomobila fabrikejo. Ne estante specialistoj, tiuj ĉi havis neniajn antaŭjuĝojn.

Plie, sperte konstatintaj la difektojn de la fervojaj organizaĵoj, ili estis efike preparitaj por serĉi la plibonigaĵojn. Ili anstataŭis la iaman organizaĵon per iu nova, pli malrigida, kaj inteligenta. Por tio, necese estis modifii la spiritostaton de la oficistoj.

La unuaj decidoj (ni jam tion diris) estis pagi ilin pli bone; poste, malpliigi la labortempon je ok horoj, kaj fine respekti kiel eble plej la ĉiusemajnan ripozon. Por tio, la cirkulado de la vagonaroj estis malpliigita, ĉiu-dimanĉe, je la minimumo.

Tiel plibonigínte la situacion de la oficistoj, Ford postulis, ke la formulo „ok horoj da laboro" estu rigore observita.

La rigidaj apartigoj inter la diversaj oficoj estis forigataj kaj unu el la ĉefaj kaŭzoj de senutilaj elspezoj tiamaniere malaperis.

Iu mekanikisto, ekzemple, ne laborante al sia lokomotivo, purigas la vagonojn, se tiu laboro speciale urĝas. La oficisto kiu disvendas la biletojn, kiam lia giĉeto estas fermita, iras helpi sian kolegon por la redaktado de la sendpaperoj.

Al ĉiu oni donas taskon plenumebla en la daŭro de 8 horoj, sed kiu reale okupos lin dum tiu tuta tempo.

La kontinua zorgo de la oficistoj kaj de la estraro estas plibonigi la organizaĵon, kaj esti neniam senokupaj, same kiel la laboristoj en la fabrikejo kiu devas produkti unu aŭtomobilon ĉiusessekunde.

Tiun spiritstaton, tute ne oftan, S-ro Ford tre rapide sukcesis altrudi, kio bone montras la mirindan efikecon de la energia organizado de klerega estranto. Kelkaj ciferoj bone montros la revoluciegon sukcesiĝintan.

La suma nombro de la oficistoj antaŭe (2700) estis malpliigita ĝis 1600, kvankam la transportoj duobliĝis kompare al la antaŭa jaro. La plendpostuloj por perditaj aŭ difektitaj objektoj estis ankaŭ duonigitaj, same kiel ĉiuj oficelspezoj.

La elspezo por karbo ankaŭ multege malpliiĝis malgraŭ la pligrandigo de la cirkulado.

Se oni komparas la rezultatojn de la antaŭa ekspluatado en junio 1920, kun tiuj de junio 1921, oni konstatas, ke la perdo kiu estis 135.920 dolaroj, aliformiĝis en profiton de 261.259!

La laborefikeco do preskaŭ triobliĝis kun unu triono da oficistoj malpli, kiu donas finan efikecon por ĉiu oficisto, multobligita de 4,5.

S-ro Ford ankoraŭ esperas plibonigi tiujn rezultatojn. Lia eksperimento meritas esti atentege observita de ĉiuj fervojaj estrantoj. Tiuj raciaj metodoj povus kaj devus esti ĉie aplikataj laŭ la bela ekzemplo de malrutina energio al ni donita de la eminentega usona inĝeniero. *Ernest Archdeacon.*

Aŭtuno.

La somero preterpasis kaj aŭtuno nun alvenis.
La folioj iĝis flavaj kaj naturo multkolore
ornamita sin preparas al la lasta adiaŭo.
Baldaŭ staros la arbaro senfolia kaj la vintro
Dense metos blankan tukon super la dezertan kampon.
Frosto tremas tra la trunkoj kaj ventego forte skuas
La fierajn altajn poplojn borderantajn la ŝoseon.
Malaperis la violoj, la trikoloretoj fermis
La okulojn mildajn, dolĉajn. Kie restis la spireto,
La feliĉo de l' printempo? Kaŝis sin malantaŭ fornon
Kaj fariĝis sonĝo, revo. Ankaŭ najtingaloj iĝis
mutaj, en la gorĝo homa kanto ankaŭ rigidiĝis . . .
Sed kuraĝu, mia koro! Laŭ la leĝo de l' naturo
Gentoj iras, gentoj venas, kaj ne longe vi bezonas
Resti en malĝojo. Estas dornrozulineta dormo,
Kiun dormas la naturo. Baldaŭ la printempa princo
kise vekos la dormantan, vokos ŝin al nova vivo!

Friedrich Jahn.

Renkonto.

Haladzosfera, ŝimflora kafejo.
La lukson mordis fum' kaj tempo jam.
Evitas ĝin la bonvesta plebejo,
apaĉoj kroĉas sin al ĝia fam'.

Per arĉo segas la kordojn cigano.
Muziko sonas: modpasinta kant'.
La gasto drinkas kun grunta rikano,
knabin' de l' kaso pudras sin kun vant'.

La sonoj tremas, ekvibras memoroj
kaj enterige kloŝas ĝemoj cent . . .
Freneze ridas fantomoj de l' koroj,
rikanon, pudron viŝas larma sent'.

La arĉo haltas. Jam mutas la sono,
nur korojn ŝiras eĥa melodram' . . .
La gast', knabino post fin' de l' kanzono
funebras pason de l' printempa am'.

„Malfruaj pentoj . . Fuŝita la tago . .
Eh, hejmen . . hejmen por kuŝigi vin!" —
la gasto grumblas, sin levas por pago . .
ĉe l' kaso ŝire ploras la knabin'.

Julio Baghy.

LITERATURO

La Gers'a Lago.

De *Rodolphe Toepffer*.

Rodolphe Toepffer (nask. 1799, mort. 1846) estis Ĝeneva verkisto kaj karikaturisto, aŭtoro de humoraj noveloj kaj vojaĝrakontoj, unu el la solaj literaturistoj en franca lingvo kies maniero similas iom al tiu de la angla Dickens. Li ridigas kaj pensigas, ne per la pli kutima spriteco brila kaj ŝerca, sed per ia simpla kaj filozofema humoro bonvola kaj amiktona.

De la vilaĝo Sixt oni povas iri en la valon de l' Arvo transirante altan montaron, kiu etendiĝas inter Cluses kaj Sallanche. Tiu pasejo estas preskaŭ nekonata kaj nur uzata de la kontrabandistoj, kiuj estas tre multaj en tiu regiono. Tiuj kuraĝaj homoj sin provizas en Martigny en Valislando; kaj vojirante, peze ŝarĝataj, tra malfacilaj vojetoj, ili malsupreniras en la internajn valojn de Savojlando, dum la doganistoj bone gardadas sur la landlimo.

La doganistoj estas homoj havantaj uniformon, manojn malpuregajn kaj pipon en la buŝo. Sidante je l' suno, ili mallaboras ĝis kiam pasas veturilo, kiu pasas antaŭ ili ĝuste nur tial, ke ĝi enhavas nenion kontrabandan.

„Ĉu sinjoro havas ion por deklari?"

„Nenion!"

Kaj tuj, malgraŭ tiu preciza respondo, ili malfermas la valizojn kaj palpadas per siaj malpuregaj manoj la blankan tolaĵon, silkajn robojn kaj poŝtukojn. La Ŝtato ilin pagas por plenumi tiun profesion. Tio ĉiam ŝajnis al mi mirinda.

La kontrabandistoj estas homoj plej bone armitaj kaj ĉiam pretaj por bori per kuglo doganiston, kiu promenus sur la vojo, kiun ili rezervis al si.

Feliĉe la doganistoj, kiuj scietas pri tiu cirkonstanco, ne promenas, aŭ neniam tie promenas.

Tio ĉiam ŝajnis al mi pruvo de delikateco ĉe la doganistoj.

Mi ofte havis aferon kun doganistoj. Miaj ĉemizoj havis la honoron esti palpataj sur ĉiuj landlimoj, de la agentoj de ĉiuj ŝtatoj, aŭtokrataj aŭ aliaj. Ili nenion trovis malpermesitan. Pri ĉemizoj, jen estas anekdoto: Mi iris Lyonon; en Bellegarde, oni serĉadis tra niaj valizoj, oni volis ankaŭ palpi nin mem, timante kaŝitajn horloĝojn, ĉar Ĝenevo estas proksima. Mi bonvole lasis fari al mi tion, sed oficiro angla, el la vojaĝantoj, vidante kion oni volis fari al li, trankvile eltiris sian tranĉilon el sia poŝo kaj sciigis, ke li tranĉos dupece „la unuan kiu volos lin palpi, kaj ankaŭ la duan".

Granda estis la impreso. La doganistoj volus ja plenumi la regularon, sed tiu grandulo el Waterloo per sia ŝtala tranĉilego ilin ege timigis. Tamen la estro aŭtoritate rediris: „Palpadu tiun homon!" Sed l' alia ripetis pli furioze: „Venu! kaj mi tranĉos la unuan, kaj ankaŭ la duan, kaj la trian kune." Per tiu vorto *trian* li montris la estron.

La afero eble finiĝus tragedie, tiel granda estis la kolero de tiu estiminda sinjoro. Tiam mi intermetis min. „Sinjoro", mi diris, „volu doni viajn vestojn al la doganistoj, kaj ili plenumos siajn ordonojn tute ne suferigante vian honoron." Tuj kiam mi tiel parolis, l' anglo, akceptante tiujn ĉi kondiĉojn rapide demetis siajn vestojn kaj ilin ĵetis tuje sur la vizaĝon de l' doganistoj. Li sin tute senvestigis, kaj mi neniam forgesos kun kia mieno li ĵetis sian ĉemizon sur la kapon de l' estro, dirante: „Jen, jen, sentaŭgulo!"

Mi havis malpli ofte aferon kun la kontrabandistoj; tamen mi havis kelkajn rilatojn kun ili, kiam mi volis trapasi sola de Sixt ĝis Sallenches trans la montoj, pri kiuj mi jam parolis.

Oni montris al mi la vojon: Unu horon antaŭ ol alveni sur la supron, oni iras borde de lageto, nomita lago Gers'a; transe oni suriras pintaron de ŝtonegoj tra ebenaĵo de neĝo frostita; poste oni malsupreniras al la arbaroj super la akvofalo de l' Arpenas. Post tri horoj da rapida suprenirado mi ekvidis la lagon. Ĝi estas lageto enkavigita inter verdantaj deklivaĵoj, kiuj rebrilas en ĝi malhelkolore, dum la travidebleco de l' akvo lasas la rigardon eniĝi profunde ĝis la muskoj, kiuj kovras la fundan teron. Mi sidiĝis ĉe l' bordo de tiu lago; kiel Narciso, mi min en ĝi rigardis . . . mi rigardis min manĝanta pecon de kokido.

Krom mi, mi vidis ankaŭ en la lago la returnan figuron de l' najbaraj montoj, de l' arbaroj, de l' tuta bela naturo kaj de du korvoj, kiuj, flugantaj plej alte en aero, ŝajnis al mi en tiu spegulo flugantaj plej profunde ĝis la antipodoj. Dum mi amuziĝis konsiderante tiun ĉi vidaĵon, homa kapo aŭ homina, aŭ besta, ĉiuokaze io vivanta, ŝajnis al mi moviĝinta sur la deklivo de l' monto, kiun mi intencis supreniri. Mi tuj levis la okulojn por distingi la objekton mem, sed mi nenion plu vidis, tiel ke, kredante ke tiu fenomeno estis nur ondmovo de la supraĵo de l' akvo, mi ekrevojiris, tre certe, ke mi estas sola en ĉi tiu regiono. Tamen, certa ankaŭ, ke mi vidis ion, mi kelkfoje haltis por rigardi ĉirkaŭen kaj kiam mi alvenis apud la loko kie mi kredis vidi la kapon, mi singardeme ĉirkaŭiris kelkajn ŝtonegojn.

Oni diris al mi malsupre rakonton pri krutpasejo inter ŝtonegoj, kie mi tiumomente rampis. Estas la momento ĝin al vi diri, mi kredas: „Dekok kontrabandistoj, ĉiuj ŝarĝataj po unu sako da Berna pulvo, pasis tie. La lasta eksentis, ke lia sako tre malpeziĝis, kaj li jam estis tute ĝoja pri tio, kiam li sagace ekpensis, ke eble la malpeziĝo okazis perde de la ŝarĝo. Estis vere: longa linio da pulvo estis videbla sur la vojo kiun li sekvis. Estis perdo, kaj ĉefe postsigno, kiu povus divenigi la marŝon de la bando kaj komprometi ĝian sorton. Li kriis „haltu" kaj, je tiu ĉi krio, la deksep ceteraj sidiĝis samtempe sur siajn sakojn por trinki iom da brando kaj viŝi sian frunton.

Dume l' alia, la sagaculo, reiris ĝis la komenco de sia linio da pulvo. Li ĝin atingis post du horoj da marŝado kaj ĝin ekfajrigis per sia pipo por detrui la postsignon. Post du minutoj . . li aŭdis belegan eksplodbruon, kiu, resonante kontraŭ la flankoj de tiuj montoj, lin mirinde surprizis: Estis la deksep sakoj, reatingitaj de la linio da pulvo, kiuj eksplodis kun la deksep kontrabandistoj sure sidantaj."

Nu, pri tio ĉi mi rimarkas:

Unue, ke tiu rakonto estas vera rakonto, agrabla kaj amuza, sufiĉe verŝajna, pruvita de la tradicio kaj de la pasejo, kiu ĉiam ekzistas ankoraŭ. Mi kredas ĝin tiel certa kiel la transpason de Hanibalo trans la monto de l' malgranda Sankt-Bernardo. Kiel oni pruvas la pason de Hanibalo trans tiu monto? Oni unue montras al vi blankan ŝtonegon malsupre de l' monto. Poste oni pruvas al vi, ke tiun ŝtonegon Hanibalo, alveninta sur la supro, solvis en vinagro.

Due mi rimarkas, ke en tiu rakonto deksep homoj pereas; sed, rimarku ĉi tion: unu restas por anonci la aferon. Tio ĉi estas la signo de modela rakonto; ĉar en batalado, en malfeliĉego, se malmultaj pereas, estas malgrande; se ĉiuj pereas, estas plena nokto.

Sed se el granda ruiniĝo unu sola saviĝas kaj postvivas por rakonti l' aferon, estas plej ĉarme. Kaj tial la historio greka, roma kaj moderna enhavas multe da similaj okazintaĵoj.

Trad. *Edm. Privat.*

FREDERIKO SMETANA

la patro de la ĉeĥa muziko

de Paul Bennemann.

☆

La 19a jarcento de la muzikhistorio karakteriziĝas per la ekfloro de la originala muziko de malgrandaj nacioj. Ĝis la 18a jarcento Italujo kaj Francujo, la klasikaj landoj de la muziko, okupis la unuan rangon; per Haydn, Mozart, Beethoven, Schubert kaj multaj aliaj, Germanujo sukcese ekkonkuris kun ili; kaj en la 19a jarcento unu malgranda nacio post la alia komencis pretendi, ke ankaŭ ilia kulturo havas la forton, esprimiĝi per muziko, kaj sufiĉan valoron, por aldoni novajn karakterizajn trajtojn al la internacia koncerto. Polaj, rusaj ĉeĥaj, finnaj, hungaraj nomoj aperas sur la programoj, kvankam ne tre multaj el ili sukcesis atingi ŝtupon proksiman ĉe la mondkonataj klasikuloj.

Bohemio jam de longa tempo estis laŭ la eldiro de angla vojaĝanto „la konservatorio de Eŭropo“. La forta inklino de la popolo al muziko kreskigis tie bonegajn instrumentistojn, kiuj sidis en ĉiuj orkestroj de la kontinento, eminentajn kantistojn kaj direktistojn. Ankaŭ komponistoj ne mankis (Zelenka, Tuma, Stamitz, Gyrowetz, Kozeluch, Wranitzky); sed iliaj verkoj ne enhavis jam karakterizajn naciajn trajtojn. La unua, kiu skribis vere ĉeĥan muzikon, estis tiu majstro, kies naskiĝtago revenas la centan fojon

je la 2a de marto 1924:
BEDŘICH SMETANA*)

Lia patro estis bierfaristo en Litomyšl kaj ne havis komprenon por la muzika talento de sia filo. Li sendis lin al gimnazio, kiun la junulo tamen forlasis sen multa profito; ĉar superforta devigo puŝis lin al la arto. Smetana ekvizitis la konservatorion en Praha, sen ia subteno flanke de la patro. Tie li rapide progresis; ĉar kvankam nehavinte regulan instruon li jam en knabaj jaroj estis lerta violinisto kaj fortepianisto. Sed maldolĉa estas ordinare la pano, kiun gajnigas la arto; tion ankaŭ spertis Smetana. Lia provo, vivi kiel libera muzikisto, malsukcesis; li falis en teruran mizeron, el kiu lin tiris Franz Liszt, kies grandanima karaktero kaj malŝpara mano ja helpis al multaj junaj muzikistoj. Liszt ne nur ebligis al Smetana, fondi muziklernejon, sed ankaŭ ĉiel propagandis por la juna komponisto, kies verkoj komence trovis nur malmultan simpation ĉe la publiko.

Tio aliiĝis, kiam en 1856 li estis elektata direktisto de la Filharmonia Societo en sveda urbo Göteborg. Liaj belaj simfoniaj poemoj *Richard III, La tendaro de Wallenstein, Hakon Jarl* tuj tre plaĉis, kvankam la juna majstro skribis ilin en terura emocio pri la perdo de la amata edzino Katarina. La kruda norda klimato estis mortiginta ŝin. Kiu kun atento aŭdos iam la 3an parton de la kvarteto por kordinstrumentoj *„El mia vivo“*, tiu sentos, kiom intima estis la kuneco de tiuj du homoj kaj kiom korŝira devis esti la doloro de la postvivanta edzo.

Sed la laboro konsolis lin; novaj taskoj logis al pli altaj celoj. En 1861 Smetana reiris al Praha. Tie li fariĝis protagonisto de la juna nacia muzika movado kaj decidis, de sur la scenejo proklami la valoron kaj esprimoforton de la muziko de sia lando: li volis fariĝi unuavice operkomponisto, krei nacian ĉeĥan operon. En dancoj kaj popolkantoj la bohema lando ja prezentas trezoron de originalaj melodioj kaj ritmoj tiom riĉan, ke talenta komponisto nur bezonis etendi la brakon, por preni plenmanojn da ili kiel naivan krudmaterialon por ellaborota artverko.

La cirkonstancoj ŝajnis esti favoraj. En 1862 oni fondis en Praha la unuan ĉeĥan teatron; kaj por ĝi Smetana skribis sian unuan operon: *„La Brandenburganoj en Bohemio“*, la unuan vere nacian ĉeĥan operon, malgraŭ la rimarkebla parenceco al la stilo de Wagner. Pli grandan, eĉ internacian sukceson havis lia dua opero *„La vendita fianĉino“* (1866). Ĝia bonhumora teksto, la popolareco de la melodioj, la nobleco de la partituro kaj la brilo de abunde riĉa moderna orkestro kondukis ĝin en ĉiujn operejojn de la mondo; kaj al la komponisto ĝi havigis la oficon de direktanto de orkestro en la nacia operejo.

El la postaj operoj *Dalibor, Libuše, La kiso, ktp.)* nur tiu kaj tiu malofte transiris la boheman limon; ĉar malgraŭ ilia muzika valoro ili suferas pro la nesufiĉe taŭgaj tekstoj. Se la genia muzikisto estus trovinta samgenian tekstpoeton, liaj verkoj estus multe pli renkontintaj internacian simpation, kiun ilia muziko plej grandparte meritas.

Sed eĉ en lia patrolando la operoj de Smetana ne tuj trovis nekontraŭbatalatan akcepton; kaj tio atakis la bonfarton de la malsaniĝema viro. Nervomalsano kaptis lin kaj finiĝis, kiel ĉe Beethoven, je absoluta surdeco. Ankaŭ tiun sortobaton li ilustras en la kvarteto *„El mia vivo“* (1876, en la kvara parto), eble la plej kortuŝa aŭtobiografio, kiun iam skribis muzikisto. Kompreneble Smetana nun devis forlasi sian pozicion kiel orkestrestro; kaj kvankam li skribis ankoraŭ 3 operojn, la plej bona verko el tiu lasta periodo de lia vivo certe estas la ciklo *„Mia Patrolando“*; serio de ses simfoniaj poemoj. Ĝi estas ĉarma epopeo, kiun la komponisto kantas al sia popolo, aŭ rakontante pri historiaj lokoj kaj personoj (Vyšehrad, Šárka, Tábor, Blaník), aŭ pentrante idiliajn bildojn el la bohema lando (Vltava, El arbaroj kaj kamparoj de Bohemio).

Estas interese, ke unu el la instigantaj kaŭzoj al tiu verko estis la neceso, ke Smetana devis serĉi monon, por konsulti kuracisto-specialiston, kiu eble forprenus de li la suferojn de le surdeco. Sed estis vane. La lastaj vivojaroj de la majstro eĉ fariĝis ankoraŭ pli malfeliĉaj: lia spirito mallumiĝis, kaj la 12an de majo 1884 li mortis en frenezulejo. La muzika mondo perdis en tiu tago homon plenan je pura, sankta kaj vera celado. La amo al lia nacio neniam fariĝis ŝovinismo; kaj kvankam li ne fariĝis internacia klasikulo, minimume *„La vendita fianĉino“*, la ciklo *„Mia patrolando“* kaj la menciita kvarteto certigas al li ankaŭ en postaj jarcentoj gloron kaj dankoplenan rememoron en ĉiuj muzikemaj koroj.

Radiotelefonan paroladon *esperantan* de S-ro Pitlík pri B. Smetana dissendos Radiojournal el Kbely ĉe Praha (ondo 1150 m) la 2 marto, je la 21 horo (C. T.) Antaŭ tio je 19.15 koncerto de Smetana-komponaĵoj.

---

*) Akcento sur la unua silabo. Bedřich = Frederiko.

Milito.

De *Guy de Maupassant.*

Guy de Maupassant (nask. 1850, mort. 1893) estis la plej lerta franca stilisto. Liaj noveloj estas realistaj kaj neniu sukcesis uzi pli trafe ol li ĉiujn povojn de la franca lingvo. Tiu traduko estis verkita de Hector Hodler en 1904 samtempe kiel tiu el Toepfler de Edm. Privat kiam ambaŭ estis ankoraŭ knaboj kaj novaj esperantistoj.

Kiam mi pensas pri tiu vorto milito, premas min mirego, kvazaŭ oni parolus pri afero malproksima, finita, abomeninda, monstra, kontraŭnatura. Kiam oni parolas pri hommanĝantoj, ni malhumile ridetas proklamante nian superecon al tiuj sovaĝuloj. Kiuj estas la sovaĝuloj, la veraj sovaĝuloj? Ĉu tiuj, kiuj batalas por manĝi la venkitojn aŭ tiuj kiuj batalas por mortigi, nur por mortigi?

La malgrandaj soldatoj, kiuj malproksime kuradas, estas difinitaj por morto kvazaŭ ŝafaroj puŝitaj de buĉisto sur la vojo. Ili falos sur ebenaĵon, kun la kapo fendita de sabrobato aŭ la brusto truita de kuglo; kaj ili estas junuloj, kiuj povas labori, produkti, utili. Iliaj patroj estas maljunaj kaj malriĉaj; iliaj patrinoj, kiuj, dum dudek jaroj ilin amadis, adoradis kiel adoradas patrinoj, sciiĝos post ses monatoj aŭ eble unu jaro, ke la filo, la infano, la granda infano edukita kun tiom da penado, tiom da mono, tiom da amo, estis ĵetita en truaĵon kvazaŭ hundo, elvundita de kuglo kaj surmarŝita, premegita, dispecigita de la kavaleriaj alsaltoj. Kial oni mortigis ŝian filon, ŝian belan filon, ŝian solan esperon, ŝian fierkaŭzon, ŝian vivon? Ŝi ne scias. Jes, kial?

La milito! . . . batali! . . . disbuĉi! mortigi homojn! . . . .

Kaj ni havas nuntempe, kun la civilizacio, scienco kaj filozofio de la homaro, lernejojn kie oni instruas mortigi, mortigi de tre malproksime, perfekte, multajn homojn samtempe, mortigi mizerajn homojn, ŝarĝatajn de familio kaj senkulpajn! . . . Ha! ni ĉiam vivadas superregataj de la malnovaj kaj malamaj kutimoj, de la krimaj antaŭjuĝoj, de la sangamaj ideoj de niaj barbaraj prapatroj, ĉar ni estas bestoj, ni restos bestoj potencataj de instinkto kaj neniel alligeblaj. Ni vidis la militon. Ni vidis homojn, brutigitajn, frenezigitajn, mortigi pro plezuro, pro teruro, pro fanfaronado, pro montramo, kiam rajto jam ne estas, kiam leĝo mortis kaj ĉia ideo pri justo malaperis, ni vidis mortpafi senkulpulojn trovitajn sur vojo kaj suspektitajn nur ĉar ili timis. Ni vidis mortigi hundojn enĉenegitajn je l' pordo de iliaj mastroj, pro provi novajn pistolojn, ni vidis kuglobuĉi bovinojn kuŝitajn sur kampo, pro nenia kaŭzo, nur por pafadi kaj ridi.

Kuniĝi en kvarcentmilhomaj anaroj, marŝi tage kaj nokte' senripoze, pensi pri nenio, nenion studi, nenion legi, neniel utili al iu ajn, putriĝi de malpureco, kuŝiĝi en ŝlimo, vivadi kvazaŭ en senĉesa idiotiĝado, rabadi urbojn, bruligi vilaĝojn, ruinigi popolojn kaj renkonti alian homan aron, ĝin frapadi, fari lagojn de sango, ebenojn de dispecigita karno miksita kun ŝlima kaj sangruĝa tero, amasojn de kadavroj, havi brakojn kaj krurojn forportitajn, cerbon dispremitan, sen profito por iu, kaj perei, ĉe l' angulo de kampo, dum siaj maljunaj gepatroj, sia edzino kaj siaj infanoj mortas de malsato, jen milito!

La militestroj estas la malamikoj de l' mondo. Ni batalas kontraŭ naturo, malklereco, kontraŭ ĉiaspecaj malhelpoj por fari pli tolerebla nian mizeran vivon. Homoj, bonfarantoj, scienculoj uzas sian ekziston laborante, serĉante tion, kio povas helpi, utili al siaj kunhomoj. Ili penadas en sia utila laboro, multigas eltrovojn, pliigas homan spiriton, vastigas sciencon, donas ĉiutage al inteligento novan sciaĵon, al sia patrio bonstaton, prosperon, forton. Okazas milito. En ses monatoj generaloj detruas dudek jarojn de penado, de pacienco kaj de genio.

Trad. *Hector Hodler.* †

TRA LA LIBRARO.

Detala raporto pri ĉiu publikaĵo okupis tro ampleksan lokon en nia gazeto. Estonte la eldonaĵoj estos bibliografie notataj en la rubriko „Novaj libroj". Sub titolo: „Tra la libraro" aperos ne plenaj sciencaj prilingvaj recenzoj, ĉar multaj aliaj gazetoj jam daŭre komisiis al lertaj kunlaborantoj tiun tre utilan laboron, sed pli simplaj ĝeneralaj impresoj de nura leganto, celanta informi aliajn legantojn pri la enhavo de la plej rimarkindaj novaperintaj verkoj.

Libretaro. — S. A. T.-eldonaĵoj. — Esperanta Biblioteko Internacia.

*

Antaŭ mi kuŝas dekkvino da nove presitaj esperantaĵoj. Krom unu ĉiuj estas malampleksaj broŝuroj. Kial Esperanto naskas kvanton da libretoj kaj tiom malmulte da veraj volumoj? Ĉu la samideanaro povas aĉeti la unuajn kaj ne la duajn? Ĉu la legantaron timigas longaj verkoj? Ĉu ĉiu ĵusa lerninto dezirante famigi sian nomon klopodas eldonigi specimenon de sia nova sciaĵo? Ĉu la esperantistoj, novemuloj, opinias, ke en epoko de kinematografo kaj senfadena telefono, dika libro apartenas al malnovmoda arĥaika speco?

Cetere ĉe manko de nutra pladego, multnombra teleretaro permesas satiĝi per gustumo de varia manĝaĵaro. Ĉu vi ŝatas opereton? Legu **„Ho tiuj fremduloj"**, en kiu per amuzaj scenoj kaj lertaj kantoj Feliks Hiller mokas Esperanton, internacian svatilon. Ĉu tro malserioza? Prenu la unuaktan dramon **„Cavalleria rusticana"** de Verga (trad. R. Castagnino) kaj vi vidos, en interesa pentraĵo de Siciliaj moroj, kiel malfidela fianĉo, malesperiginte la trofidemulinon, estas murdata de l' trompita edzo. Ĉu vi ne ŝatas teatraĵon? Jen **„Ĥinago"** de Jack London (trad. Philip Kalisky) impresa rakonto kaj akra satiro de l' blankrasa kolonizado, en kiu, pro nomsimilo, kompatinda ĉino estas senkapigita anstataŭ alia. Ĉu tro terura? Malfermu do la duan kajeron de **„Penseroj"**, kie Salo Grenkamp-Kornfeld gustplene elektis kaj bonege tradukis parolojn famajn aŭ trafajn pri etiko, tempo, feliĉo, devo, vivo, amo kaj esperantismo, aŭ se vi preferas versojn, la poeziaron **„Guto post guto"**, kie P. Hitrov kolektis dudekon da originalaj poemoj, po unu el ĉiu aŭtoro. (S-ino Hankel kalkulas „pacienco" trisilaba, kaj S-ro Kühne „kuriozaĵo" kvarsilaba. Naturaj lingvoj posedas tiajn poeziajn liberojn, sed ĉi tiu speciale tute ne taŭgas por Esperanto.) Se fine vi inklinas al klasikaĵoj, ne forgesu, antaŭ ol la verkon mem, legi ĝian prienkondukon **„Faŭsto, konciza komentario"** de Max Butin, ĉar sen ĝi vi eble malmulton komprenos en la traduko de l' Goethe-a poemego.

*

Sennacieca Asocio Tutmonda komencis eldoni literaturan kaj fakan verkaron. Ĵus aperis dua eldono de **„For la Neŭtralismon!"** en kiu E. Lanty difinas la sennaciismon, kaj sub la titolo **„Dokumentoj de Komunismo"** aro da fundamentaj skribaĵoj por revolucianoj; ili estas: la fama „Komunista Manifesto" de Marx kaj Engels, la „Konstitucio de Ruslanda Sovjeta Respubliko", la „Programo de Rusa Komunistpartio" kaj la „Manifesto de Komunista Internacio". Kelkaj preseraroj ne malhelpas facilan komprenon de tiuj politikaj traktaĵoj en iliaj stile laŭdindaj tradukoj.

*

La firmo Ellersiek kaj Borel represigas la elĉerpitajn numerojn de sia kolekto **„Esperanta Biblioteko Internacia"**, kiu prezentas riĉan elekton el la diversnaciaj aŭtoroj kaj provizas varian bonan legaĵon por lernintoj. Estas nun haveblaj en dua aŭ tria eldono: **„El komedioj"**, ĉerpaĵoj el la Zamenhofaj tradukoj de Revizoro kaj Georgo Dandin, **„Japanaj rakontoj"** kaj **„Bulgaraj rakontoj"** por ŝatantoj de fremdaj literaturoj, **„Noveletoj el la Nigra Arbaro"** por sentimentuloj, **„La patrino"**, vera forta romaneto, **„La instituto Milner"**, sprita humoraĵo, kaj **„Konsiloj pri Higieno"** por tiuj, kiuj emas zorgi sian personan Esperantistujon aŭ -ingon.

15 januaro 1924. *G. S.*

*

(Pri la eldonantoj de l' cititaj libroj vidu en lasta numero de „Esperanto", paĝo 10).

LINGVAJ STUDOJ

La Lingvo Disvolvanta

de *Petro Stojan*, L. K.

Jaro por la homo egalvaloras kiel jarcento por la lingvo; Nerono reĝis dekkvar jarojn, la lingvo latina reĝis dekkvar jarcentojn. La tempokalkulo por arta lingvo eble laŭ alia mezuro devas esti farata; tamen ĉiuokaze nia komuna komprenilo estas juna kreaĵo, treege juna, se ni komparas la nunon kun la estonto imagata. Se la lingvo internacia, fakte tutmonda, povas kompariĝi je la kverko potenca, enradikita forte en la tero kaj disetendinta larĝe siajn branĉojn en la aero, tiuokaze nia hodiaŭa lingvo devas simili je la juna kreskaĵeto antaŭ nelonge aperinta el la glano, kreskaĵeto jam kun folioj kaj kun radiketoj, sed ne arbo, ĉar tro malgranda, herbosimila, malforta ĝi estas. Se tiu kreskaĵeto povus sin konscii, ĝi sin sentus „vera, granda, finita“. Se tiun kreskaĵeton najbaras formikoj, ili ĝin vidas grandega, potenca, riĉa.

Kaj por nia esperantista mondo, por nia mikrokosmo, Esperanto ŝajnas „vera, granda, finita“ lingvo kun „vera, granda, riĉa“ literaturo. Kiel en intimeco de unu familio ŝajnas esti grandegaj la malgrandaj aĵoj kaj okazintaĵoj, la plej sensignifaj ŝanĝoj kaj paŝoj. Esperanto, la estonta kverko, kreskas en nia familia rondo, ĝi estas nia unika objekto de zorgoj kaj esperoj, kaj ĝi absolute dependas de ni mem, ĉar ĝia sano kaj vivo povas esti pli aŭ malpli fortaj, laŭ niaj pli aŭ malpli grandaj atento, zorgo, saĝo.

Sed kiu altiĝos super la formikejo kaj malproksimiĝos ekster la intima familio, tiu vidos grandegan homaron, apenaŭ konatan nur surface, kiu ondumas kaj svarmas, senhalte pligrandiĝanta. Nia familia rondo aspektos tiam en la homaro, kiel unu el blankoŝaŭmaj ondoj rulantaj sur la oceanan bordon, el la senlima oceano mistera kaj potenca.

Estas kortuŝe vidi kiel infanoj ame kaj lude zorgas pri la planteto en la familia ĝardeno. Sed la ĝardenisto kiu rigardas estontecon saĝe preparas por la planteto lokon kie ĝi iam fariĝos la giganta kverko. Ĉu la ĝardenisto lasos la planteton en la ombro, inter fiherboj rapide kreskantaj? Ne, li detruos la ĉiujarajn parazitojn por ke la juna kverketo ricevu libere la aeron kaj la sunon. Se li vidos unu branĉeton infektitan, li ĝin fortranĉos por savi tutan vivon de la arbeto. Se la sekvetero tro daŭros, li verŝos la akvon por nutri ĝin. Nur tiel, elvivos la kverketo en la ĝardeno, dum pereos la ceteraj elglanaĵoj inter la fiherboj.

* * *

Al ĉiuj kleraj amikoj de Esperanto devas veni kaj reveni la pensoj: ĉu nia lingvo ricevas sufiĉajn zorgojn? Ĉu ne estas danĝera tiu libera evoluo kiu similas malordon? Ĉu decas por la arta lingvo la sama evolua vojo kiun trairas la naturaj lingaĵoj? Ĉu estas saĝe, ke la lingvon pliriĉigas ĉiuj memvolaj amatoroj, dum la kompetentuloj nur observas, la brakoj krucitaj?

Tiaj demandoj jam staris antaŭ niaj samideanoj kiuj hieraŭ oferis sin por nia afero. La samaj demandoj nun staras antaŭ niaj okuloj. Sed nenia utilo estos por Esperanto se tiuj demandoj ne staros antaŭ niaj ĉefuloj kaj se tiuj demandoj ne estos responditaj prudente kaj kuraĝe.

La sorto de Esperanto kuŝas en manoj de la aktiva esperantistaro. Nur per vola ago de izoluloj povas evolui nia lingvo. Do, ĉiu samideano bone memoru, ke ankaŭ li kunlaboras pri la vivo kaj sano de Esperanto, ke li ne rajtas inercie atendi aŭ esperi alies agadon. Se ĉiu el ni penos skribi kaj paroli regulan, klaran, harmonian lingvon, tiam la Esperanto estos regula, klara kaj harmonia. Male, se ni malzorge kaj maldiligente studos kaj uzos nian lingvon, esperante, ke iu alia ĝin prizorgos, tiam nia komuna ilo fariĝos malorda, neregula kaj neharmonia. La potenco, kiu ĝis nun vivigis Esperanton, ne estis ie en la ekstero, ĝi estis en la animo de la esperantistaro. Ankaŭ potenco kiu triumfigos nian lingvon ne staras ekster nia familio, ĝi kuŝas en niaj koroj. Se Esperanto povas ankoraŭ disvolviĝi, ĝi disvolviĝos per nia volo, alie ĝi sekiĝos kaj defalos kiel aborta frukto.

* * *

Estas tri imageblaj vojoj laŭ kiuj homa lingvo povas iri en sia evolua vivo. La unua, la vojo pure natura, observiĝas ĉe la sovaĝaj gentoj kiuj libere ekzistas sen literaturo, sen sciencistaro, sen religio organizita. Sur tiu vojo, rapida kaj serpentanta, la pure natura idiomo plena je riĉa fantazio, ankaŭ je kaprica ŝanĝado, senĉese aliiĝas tiamaniere, ke la neparo iufoje ne komprenas siajn avojn. La Brita Biblia Societo, kiu eldonadas la Sanktan Skribon por diversaj gentoj, konstatis, ke en la daŭro de cent jaroj kelkaj afrikaj gentoj tiom aliigis sian langaĵon, ke la unuaj eldonoj de Evangelio, faritaj por ili, nun estas por ili kvazaŭ fremdlingvaj. La dua, la vojo pure arteca, estis vidata ĉe la aŭtoroj de artefaritaj lingvoj, kiuj ŝanĝiĝis pro volo de la aŭtoro dekretanta tiun aŭ alian novaĵon; ankaŭ la lingvoj mortaj (heleno, latino, zendo, sanskrito) estis per tia metodo reguligataj kaj pliriĉitaj. Sur tiu vojo, zigzaga kaj arbitreca, la lingvo similas balzamitan kadavron aŭ mumion, kiun la adorantoj plibeligas per aldonaj ŝmiroj, ornamas per aldonaj juveloj, protektas kontraŭ la tempo per antiseptiko. La tria vojo, natura kaj arta samtempe, estas plej ordinara evoluo kiujn travivas ĉiuj kulturaj lingvoj, jam ne sovaĝaj, ankoraŭ ne mortaj. En la lingva vivo ekzistas do du esencaj organoj kiuj sin kompletigas reciproke. Permesu, ke mi faru krudan komparon, helpontan en la kompreno. La koro de la vivanta lingvo estas ĝia natura fonto, la cerbo estas ĝia arta reguligilo. Nurkoraj estas la sovaĝaj langaĵoj plenaj je infana intuicio, graciaj en sia kronika forgesemo. Nurcerbaj estas la kristalecaj lingvoj, rigidaj, monumentaj, timigaj per sia mekanika grandeco. Kompletaj estas la vivantaj kulturaj dialektoj kie la poezia infaneco de l' popola kreado miksiĝas kun la severa maljuneco de l' scienca klasifiko.

Sur kiu vojo, el la tri nomitaj, iras aŭ almenaŭ devas iri nia lingvo? La plimulto certe diros, ke la tria meza vojo estas la vojo de Esperanto, ke la aŭtoro de nia lingvo science reguligis la materialojn, kiujn la esperantistaro kolektive fruktigas en sia bonkora agado. Ni rigardu do iom pli proksime la nunan disvolviĝadon de nia lingvo. Ĉu oni devas pruvi, ke Esperanto ne estas lingvo „finita“, kia ja estas ekzemple la latino, ke Esperanto ne estas lingvo „matura“, kia ja estas la franca, kies historio komenciĝis antaŭ mil jaroj?

Tamen Esperanto estas la vera lingvo, kies evoluo fluas tiom pli rapide, ol evoluo de iu nacia lingvo, kiom la inkuba periodo de la esperanta kreo (1875—1887) estis malpli longa ol la jarcenta naskiĝo de ĉiu nacia dialekto. Se ni atente studas gazetojn kaj librojn presitajn en Esperanto en la 1890, 1900, 1920, ni rimarkas, ke kun la tempo en nia lingvo okazas aliiĝoj multeflankaj, kiuj tamen ne ŝanĝas la ĝeneralan aspekton. Tiuj aliiĝoj povas esti klasitaj jene:

a) malaperas el la uzado primitivaj radikoj,
b) aperas novaj radikoj,
c) malaperas primitivaj kunmetaĵoj,
ĉ) aperas novaj kunmetaĵoj,
d) malaperas kelkaj parolturnoj,
e) aperas novaj esprimoj,
f) malaperas primitiva ortografio de propraj nomoj,
g) aperas nova maniero skribi proprajn nomojn.

Ekzemple, malaperis primitive uzitaj *kian, tian, deino, vipero* (kiam, tiam, diino, vipuro). Aperis novaj radikoj *aĉ, urĝ, bild, ard, dign, evolu, ism, mild, lukt.* Malaperis: *vidigo* (pruvo), *naskonteco* (gravedo), *jelabori* (plugi), *neatendema* (senpacienca), *instruitulo* (scienculo). Aperis: *kapalkape, disradii, eligi, dumtempe, forlasiteco, vidalvide, unuopulo, priresponda* . . Malaperis: *sidigu vin!* aperis: *sidiĝu!* Malaperis: *Kanadujo, Siberujo, Palestinujo, bohemoj, irlandoj, braziloj* . . aperis: *Aŭstrio, Siberio, Kanado, Palestino, ĉeĥoj, irlandanoj, brazilanoj* . . .

Do, apud la ĥaoso, de popola libera uzado devas ekzisti „lingva centro“ kiu racie kaj science reguligas la lingvon, kiel ĝin reguligis ja Zamenhof. Tiu lingva centro devas ne nur observi, registri kaj konstati, ĝi devas helpi al la vortoserĉantoj, helpi ĉu per izolaj konsiloj, ĉu per sistemaj vortaroj. Zamenhof ja revis pri ampleksa sistema vortaro kiu enhavus ne nur jam ekzistantajn vortojn, ankaŭ la mankantajn. Sole la centro povas (se ĝi volus) havigi utilajn internaciajn elementojn por la pliriĉigo, ĉar tiuj elementoj estas ĉerpeblaj el specialaj multekostaj fakvortaroj, neakireblaj por la izolulo, precipe en provincaj urbetoj. Post la socia organizo, nun venis momento prepari la lingvan organizon, la „lingvan centron“ aktivan kaj utilan. Ĉu la L. K. volos aŭ povos fariĝi tia centro? La morgaŭa tago ĝin montros per la tempo mem.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

Informilo de Esperantistaj Societoj. — Kroniko. — Alvokoj.

Svisa Esperanta Societo.

La C. K. ricevis de Bern ĝojigan raporton: S-ro D-ro Spielmann faris tie propagandan paroladon ĉe la poŝt- kaj telegrafoficistoj, sekve de tiu malfermiĝis kurso kun 18 geoficistoj. Kvankam S-ro Spielmann estas jam tre okupita, li prenis ankoraŭ sur sin la taskon de Delegito de UEA pro kio ni lin kore gratulas kaj bondeziras. La Berna grupo ankaŭ aŭdis interesan paroladon de samideano D-ro Ruth, adjunkto de la Departemento de justico kaj polico.

La Zurich'a grupo havis belan Zamenhofan feston kun lumbildparolado de S-ro Schurr.

S-ro Perlet, Chutzenstrasse 17, Bern, sciigas la samideanojn, ke la fotografaĵo de la Berna kunveno estas mendebla ĉe li. Bedaŭrinde la rondiriganta foto ne ankoraŭ revenis de ĝia vojaĝo kaj ni petas la membrojn kiuj ricevos ĝin rapide transdoni la foton laŭ la kunmetita listo.

Lastminute la C. K. ricevis raporton de la Grupo Lausanne pri la regulaj kunsidoj kaj ĝojigan informon pri fondiĝo kaj aliĝo de nova grupo en Olten, kie kunvenoj okazas regule unuan kaj trian ĵaŭdon de ĉiu monato en Hotelo Löwen. Prezidas S-ro Paul Hofer kaj sekretario estas la delegito de UEA, S-ro W. Haase-Meister, Arauerstrasse 46. Koran bonvenon kaj bondeziron al la nova kolegaro!

* * *

Ĉeĥoslovaka Esperanta Instituto.

(Fondita 27 junio 1923 kun ministeria aprobo.)

Adreso: Praha II, Křemencová 17, Tel. 6977.
Ĉeĥa poŝtĉekkonto 33554.

Raporto.

Nombro de korespondaĵoj: 290, kun propagandaj presaĵoj: 1255. — Generala konstituiĝanta kunveno okazis 11. IX., komitataj 25. X., 20. XII.

∴ La sciigo pri konstituiĝo de Ĉ. E. I., sendita al 107 centraj ŝtataj oficoj, komercaj ĉambroj, industriaj, turismaj kaj kulturaj institucioj, kaŭzis multe da favoraj respondoj poresperantaj.

∴ Evidentiĝo de ministeriaj dekretoj priesperantaj. — Intervenoj ĉe ministrejoj por instruado kaj internaj aferoj kaj bohemia landestrejo.

∴ 20 septembro malfermitaj 3 kursoj por 49 komencantoj; instruis S-roj Eiselt, Pitlík.

∴ Partopreno ĉe Esperanto-ekspozicio en Přerov, ĉe turisma en Praha. — Oficiala konferenco pri turisma movado kaj ĉeĥgermana amika kunveno en Česke Lípa (Böhmisch Leipa). — Agitado ĉe hotelestroj koncerne la rabatigon al vojaĝantaj esperantistoj kaj enskribon en la Adresaron de la Esperantistaj Renkontejoj. — Poresperanta propagando en kelneraj organizaĵoj. — Regula rubriko de Ĉ. E. I. en gazeto „Studenta turismo", anoncoj en horaro de „Čedok" kaj artikolo en „Turista kalendario 1924". — Komunikoj al la ĉeĥa gazetaro pri Esperantonovaĵoj. — Multe da informoj pri- kaj peresperantaj.

∴ Daŭrigata varbado de novaj membroj al UEA, ĝis nun 14. [Dankon! Red.]

∴ La membroj aŭskultis radio-paroladojn de samideanoj Merchant, Fairbairn, Dresen, en militista radiostacio Petřin, kiun oni permesis al ili trarigardi la 26 oktobro.

∴ La Instituton vizitis: S-roj Applebaum, Liverpool; Gerstner, Karlsruhe; Häfker, Dresden; Charles, Paris; Rousset, Avignon.

∴ Programo, efektivigota en la venonta kvaronjaro: 1. Malfermo, 9. I., de legejo kaj reprezenta klubejo de Ĉ. E. I. en Mikulanaská 7, I. et., Palaco Nostiz, kunvenoj ĉiumerkrede je la 8 v. — 2. Malfermo, 14. I., de la „Privata esperanta lernejo" de Ĉ. E. I., aprobita per instruadmin. dekreto 131488, 7. XII. 23, kiun estros lingva sekcio de Ĉ. E. I., Čánský, Eiselt, Pitlík, Procházka, Šupichová, prezidata de lernejestro S-ro Eiselt. — Morala subteno al propono de prof. Fridrich pri internaciigo de ĉs. studentaj turist. noktejoj, alirebligotaj al esperantista vojaĝanta junularo. — Radiotelefonia parolado en Esperanto de Pitlík pri ĉs. turismaj vidindaĵoj, 31. I., je la 7.50 v. el Kbely, 1130 m, 1 kw. — Pretigo de lumbilda pruntedonota parolado. — Esperanto-tago, 22. III., dum la printempa foiro en Praha kun foirtenda ekspozicio kaj komercesper. propagando.

* * *

Esperantista Literatura Asocio.

Administracio: Paul-Gerhard-Strasse 22, Dresden-A., German.

Regularo de E. L. A.

Motivo kaj celo.

1. Konatiĝo inter la verkistoj, perkoresponda kaj laŭeble persona.
2. Reciproka helpo per kontrolado de manuskriptoj *antaŭ* la presigo.
3. Evito de malhelpa konkurado, ekz. samtempa eldono de egala aŭ simila ellaboraĵo, duobla traduko de l' sama verko ktp.
4. Perfektigado de nia literaturo.
5. *Jara* kotizo, pagota komence de l' kalendara jaro, estas 5 frankoj por bonvalutaj landoj. Malbonvalutaj pagu la sumon de *unu* svisa franko, germanaj unu ormarkon. Oni sendu la monon, se iel eble, letere en *naciaj* monbiletoj.
6. Korespondado per respondpago. (Respondkuponoj aŭ respondkartoj).
7. Fideleco al la Fundamento.

Ĉiu esperantisto povas fariĝi membro, kiu per libro, gazet-artikoloj aŭ poemoj pliriĉigis nian literaturon.

Membro ankaŭ povas esti persono, kiu science, fake aŭ mone subtenas la asocion.

Raportoj aperas en „Esperanto", oficiala gazeto de UEA, Genève. Abono al la gazeto „Esperanto" ne estas deviga, sed tre varme rekomendata.

Februara raporto.

Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos.

Nia altŝatata prezidintino S-ino M. Hankel en februaro festos sian okdekan naskiĝtagon. Sendube mi agas en la senco de la „diligenta kolegaro", al kiu la „reĝino" kun koro kaj animo daŭre apartenas, esprimante al ŝi sincerajn bondezirojn kunigitajn kun varma danko pro ŝia sindona laborado dum dekdu asociaj jaroj. Amo al Esperanto ĝenerale kaj amo al E. L. A. speciale sentiĝas el ĉiuj ŝiaj skribaĵoj, el la multaj, multegaj afablaj respondoj al demandoj pro traduko, kontrolo kaj presigo. Ŝiaj bonaj konsiloj flugadis al ĉiuj landoj.

Kiel S-ino Hankel jam anoncis en sia lasta, la januara raporto, la subskribintino laŭ deziro de la „reĝino" komence de tiu ĉi jaro prenis sur sin la prezidon de E. L. A.

La ŝatata kolegaro estas kore petata, transigi la ĝojan konfidon, kun kiu en ĉiuj okazoj ĝi sin turnis al nia asocio, ankaŭ al la nova prezidantino. Dum dekdu jaroj estinte sekretariino kaj laste vicprezidantino, ĉi tiu bone konas ĝojojn kaj suferojn de la asosio. En malnovaj senco kaj maniero, sed kun novaj forto kaj amo ŝi komencas labori.

Kvankam tre prefere ni laborus nur por kaj per idealoj, ni tamen ne tute povas malhavi iom da mono en nia kaso por plej necesaj elspezoj: leter-papero kaj poŝtmarkoj. Tial tre dezirinde estas, ke oni nun pagu la kotizon por 1924. Jam de kelkaj jaroj nia asocia jaro komenciĝas kun la kalendara; tio estas pli simpla, pli facile memorebla. Pro troaj poŝtkostoj ne estas eble al ni — kiel tio okazas en aliaj unuiĝoj — sendi al la karaj kolegoj apartajn petojn pri kotizo-pago; ni devas kontentiĝi je nia peto ĉi tie en la raporto, kaj ni esperas, ke ĝi sukcesos plenumiĝante.

En la regularo mem sin trovas la necesaj instruoj, sed jam ĉi tie ni akcentas, ke oni bonvolu sendi la kotizon de nun al la nova administrejo: F-ino J. Zschepank, Paul-Gerhard-Str. 22, Dresden-A.

Mallonga resumo el nia regularo sin trovos en la jarlibro de UEA por 1924. Kiel kotizo por germanoj ni devis altigi ĝis 1 ormarko.

Nia kolego H. Steding, Bremen, ĵus sendis la tradukon de la opero „Der Freischütz" (La liberpafisto) de Friedr. Kind, muziko de Karl Maria von Weber.

Ĉi tiun tradukon S-ro St. verkis esperante, ke oni povos ĝin prezenti dum la 16a kongreso en Wien. Pro lokaj kaj teknikaj malfacilaĵoj tio bedaŭrinde ne ebliĝos. Ni deziras, ke tamen „La liberpafisto" iel kaj ie estos uzata, prezentata.

J. Zschepank.

Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj

OFICIALA INFORMILO.

Aperas ĉiumonate.

Jarkotizo: 6 ŝil. ang. [5 ŝil.], 6 jen jap. [5 jen], 12 Fr. fr.-belg. [10 Fr. fr.-belg.], 15 lir. [12 lir.], 15 Kč. [12 Kč.]; malbonvalutanoj el Aŭstrio, Germanio, Hungario, Polio kaj Rusujo pagas 2 fr. sv. [1 fr. sv.]; membroj de tie ĉi ne nomitaj landoj pagas 6 fr. svisajn [5 fr. sv.]. Monsumon en la krampoj pagas membroj malnovaj.

Se la membro ne povas pagi sian kotizon per papermono en citita valuto, pagu ĝin per respondkuponoj en indikita egalvaloro per rekomendita letero.

Redaktoro: Josef Blažek, inspektoro, Olomouc, Müllerova 24 (Ĉeĥoslovakio) (akceptas ĉiujn manuskriptojn por la Oficiala Informilo).

Kasisto: Emanuel Kubásek, revizoro, Plzeň, Lobezská 12 (Ĉeĥoslovakio) (akceptas ĉiun monon por la I. A. E. F. kaj la Oficiala Informilo)

Morala devo de ĉiu nia ano estas, ke li alvarbu almenaŭ unu fervoran membron

Modelon de „ALIĜILO“ vidu en O. I. januara „ESPERANTO“ 1924.

Bonvolu atente tralegi ĉiujn niajn ĝis nun en „La Fervojisto“ (1-a n-ro julio 1923) kaj en O. I. (depost aŭgusto-septembro ktp. aperintajn sciigojn.

(Aliĝo al UEA estas rekomendata al ĉiuj I. A. E. F.-anoj).

Proksimiĝas la XVI^a Universala Kongreso de Esperanto; tial pro organiza graveco ni publikigas hodiaŭ la ekstrakton el nia ĝenerala programo asocia kaj el niaj en Helsinki 1922 aprobitaj statutoj: Krom propagando, instruado de Esperanto inter fervojistoj, eldono de fakterminaro, fakrevuo ktp., kreskigo de fortika sento de solidareco inter la membroj.

Membroj estas: a) aktivaj, b) subtenantaj [eĉ neesperantistoj], ambaŭ pagas tiusaman jarkotizon; aktivaj rajtas en jarkunvenoj voĉdoni, c) membroj dumvivaj pagas unufoje por ĉiam 100 fr. svisajn, d) membroj honoraj.

La kotizo ĉiujara estas fiksata denove de la jarkunveno; ĝi estas pagata al la kasisto en nacia mono per registrita letero, per papermono, per bankĉeko aŭ per respondkuponoj; ĉiu membro, kiu pagis, ricevas senpage la revuon nuntempe Ofic. Informilon, aperantan ĉiumonate en Genève, UEA „Esperanto“, kaj la membrokarton (legitimacion), kiu estas prolongata ĉiujare.

La estraro: a) la prezidanto S-ro Bontemps kaj vicprezid. S-ro Blažek; b) sekretario S-ro Barvíř; c) kasisto S-ro Kubásek; d) unu asesoro po ĉiu lando, kie ekzistas membroj de IAEF; de ili dependas la asocia prospero, ĉar ili estas niaj ĉefkunlaborantoj. (Iliajn nomojn vidu en „La Fervojisto“ N-ro 1, paĝo 2 kaj O. I. en novembra „Esperanto“).

La estraro estas balotata en la asocia jarkunveno; ĝi kunvokas la ĉefkunvenon okaze de U. K. de Esperanto kaj publikigas la tagordon almenaŭ 13 semajnojn antaŭe. La proponoj en Esperanto skribitaj, diskutotaj kaj decidotaj en la ĉefkunveno, ne devas alveni al la estraro pli malfrue ol 10 semajnojn antaŭ la kunveno.

En la jarkunveno en Nürnberg estis elektitaj du asociaj revizoroj S-roj Steiner kaj Urbanec (anstataŭanto S-ro Inĝ. Novák).

Ĉeĥoslovakio.

La ĉeĥoslovaka fervojministerio aperigis ĝis nun en sia oficiala bulteno „Uřední Věstník ministerstva železnic“ jenajn sciigojn:

1. „Internacia Asocio de la Esperantistaj fervojistoj“ estis refondita post 6 jara paŭzo dum la XIII^a Universala Kongreso de Esperanto en Praha 1921 de partoprenintaj ĉiufakaj fervojistoj el 12 diversaj nacioj. La celo de la asocio estas: (krom propagando kaj instruado de l' internacia helpa lingvo) eldoni esperantan fervojan fakvortaron, eldonadi esperantan fervojrevuon, ebligi al la asocianoj la vojaĝadon en fremdlandon kaj ilian restadon ĉe eksterlandaj asocianoj kaj plifaciligi la restadon de infanoj de asocianoj en fremdlando interŝanĝe pro celo kultura ktp. La ministerio de fervojoj rekomendas al ĉiuj fervojistoj, ke ili laŭ la ebleco lernu internacian helpan lingvon Esperanto.

(Aperis en citita Bulteno, n-ro 40, jaro 1921.)

2. **Ĉeĥo-esperanta kompendio por la fervojistoj.** La trajnrevizoro, oficialo Josef Šilhart eldonis nunjare en Nymburk (stacio apud Praha) per sia propra elspezo ĉeĥo-esperantan konversacian kompendion sub la titolo „3300 ĉeĥo-esperantaj frazoj por la fervojistoj eĉ vojaĝantoj“. Post konciza gramatika enkonduko, en kiu estas klarigitaj fundamentaj reguloj de esperanto-gramatiko, konatigas la aŭtoro la legantaron en formo de konversacio kaj en koncizaj frazoj kun rilatoj ĉiufakaj de fervoja servo. La libro enhavas 223 paĝojn kaj kostas 22 Kĉ; sendo per poŝto je 1 Kĉ. alpago. (Ev. n-ro 42.999). Aperis en citita Bulteno, n-ro 47, jaro 1923.

3. Ankaŭ la ministeria ordono de 30^a aŭgusto 1921, n-ro 45.959, Pres. 2, preferas tiajn fervojistojn, kiuj scias lingvon „Esperanto“ kaj havas tiurilatan noton en siaj priskribo-(kvalifikotabeloj) listoj, se ili kandidatas je oficoj, en kiuj estas postulata la kono de fremdaj lingvoj.

Rimarko de redakcio: Estas klare, ke ankaŭ la ĉeĥo-slov. fervojministerio, precipe la departemento por movado kun fremdlando, montras favoran intereson por Esperanto-lingvo.

La publikaĵo estas rekomendata al ĉeĥoslov. fervojistaro.

Esperanto-Kursoj por fervojistoj.

En Hradec Králové (Ĉeĥosl.) gvidas [laŭ „La Progreso“] S-ro Vojtěch V. kurson por 11 fervojistoj; ni esperas, ke S-ro kursgvidanto baldaŭ aliĝos kun ĉiuj 11 kursanoj al IAEF.

Similan aliĝon promesis S-ro Ilija Puhalo, kursgvidanto, delegito de IAEF por Jugoslavio en Zagreb.

* * *

La redakcio de O. I. povas garantii precizan publikigon de manuskriptoj skribitaj nur unuflanke kaj tre legeble sur sufiĉe granda papero; ĝi ŝatos ĉiam seriozajn, sincerajn dezirojn de niaj aktivaj membroj rilate plibonigon de enhavo de nia O. I.

Finnlando.

Esperanto kaj la fervojoj. Inter la fervojistoj troviĝas pluraj Esperantistoj, sed ĉiuj ankoraŭ ne aliĝis al „Esperanto-Societo de finnlandaj fervojistoj“, fondita en Helsinki dum la XIV^a U. K. de Esperanto, aŭ al IAEF. Nia plej proksima penado estas enkonduki Esperanton en ĉiuvintrajn lernokursojn aranĝatajn de la fervoja administracio.

* * *

Laboro por abstinenco inter la fervojistoj komencis pliviglîĝi en la lastaj tempoj. La fervojistoj havas propran grandan societon, kies prezidanto estas mem la trafikdirektoro T. Blässar, estro de trafikdepartemento. La lando havas plenan alkoholmalpermeson de la jaro 1919, sed kiel ĉiujn leĝojn oni povas rompi ankaŭ ĉi tiun bonan leĝon. Tial estas la laboro por abstinenco ĉiam bezonata.

H. Salokannel.

* * *

Fervoja jarkunsido en Nürnberg, 3 aŭgusto 1923.

(Daŭrigo.)

Salutparolo kaj raporto de nia rusa asesoro S-ro Mikaelo Valentinov pri Esperanto-movado inter rusaj esperantistaj fervojistoj.

(Farita la 3^{an} de aŭgusto 1923 en Nürnberg.)

Dum pasinta jaro en Ruslando Centra Komitato de sovetlanda esperantista unuiĝo sukcesis trovi esper. fervojistojn en 15 diversaj lokoj de nia vastega lando; 12 S-roj esprimis la deziron aliĝi al nia asocio.

La 10. V. 1923 en Petrogrado refondiĝis la fervojista sekcio ĉe la Oktobra fervojo (la plej ĉefa en la sovetlando).

Okazis lekcioj kaj nuntempe estas gvidataj kursoj por 62 personoj.

Rusaj samideanoj salutante la ĉeestantojn, alvokas la eksterlandajn samideanojn por plilarĝigi la propagandon de nia lingvo inter la fervojistoj kaj ekzistas spertuloj, kiuj havas *la kapablecon* kaj celon *partopreni* senprokraste la *prilaboron* de nia urĝe bezonata *faka vortaro*.

Ni estas certaj, ke plivigliginte nian propagandon kaj helpante al S-ro Habellok kaj siaj estroj de nia asocio, ni baldaŭ atingos plej bonajn rezultojn, nia anaro pligrandiĝos kaj ni sukcesos *regule aperigadi nian fakrevuon*.

Saluton al vi karaj samideanoj kaj ankaŭ al viaj kamaradoj, kiuj ne sukcesis ĉeesti la XV^{an} Kongreson.

Mikaelo Valentinov.

KRONIKO.

Azio.

Multe da novaĵoj el la „Suna Imperio“ nuna Ĉina Respubliko. La elekto de S-ro Won Kenn en la Centran Komitaton de la movado renkontis varman aprobon kaj konsenton. Ni citas la parolojn de la ĉina gazeto „La verda Lumo“, aperanta en Shanghai:

„La unuan fojon samlandano estis elektita en la supera gvidada institucio. S-ro Won Kenn estis elektita interkonsente de K. R. kaj UEA kiel ano de la Centra Komitato, kie kun kvin aliaj komitatanoj S-ro Kenn gvidos la ĝeneralajn interesojn de la movado. Ni devas danki la citilajn instituciojn, ĉar tio ja signifas, ke ili aprobas la longtempan laboron de la ĉinaj samideanoj“....

Funkcias kursoj en Anpien (Siensi), Shanghai, Chansha, Chintan, Kanton Tsinan kaj Wuhu. En Shanghai fondiĝis esperanta biblioteko. En Pekin malfermiĝis Esperanto-Kolegio; enskribiĝis por la unua kurso 170 personoj. Ĉeestis la ceremonion de malfermo interalie eks-vicministro de eduko S-ro Ma Si-Lun parolinte pri „Forigo de natura muro inter popoloj“ kaj la kolegiestro S-ro Tan-Hsi-Hun kiu parolis pri „Esperanto kaj homara progreso“ (La Verda Lumo N-ro 1).

El cirkulero sendita de la „Japana Asocio por la Ligo de Nacioj“ ni eltiras:

Post la kataklismo okazinta en nia lando, la rekonstruo komenciĝis esperplene, tiel same Esperanto-movado pli vigliĝis ol antaŭe.

„Japana Asocio por la Ligo de Nacioj“ jam de longe bone sciis la necesecon de internacia lingvo, sed pro multega okupateco ne povis ĝin efektivigi. Nun la Asocio aranĝis Esperanto-Fakon sub la dankinda helpo de Japana Esperanto-Instituto.

La Esperanto-Fako nun aranĝas kurson por 50 asocianoj, sub la gvido de S-roj K. Ossaka kaj M. Oi, komitatanoj de Japana Esperanto-Instituto.

*

Kelkaj entuziasmaj samideanoj de Yokohama (detruita de la terura tertremego en septembro) nun rifuĝas tien ĉi kaj kunlaboras kun la lokaj Esperantistoj, do oni atendas viglan propagandadon dum la vintro. Lastan semajnon oni kunvenis por aranĝi.

*

Esperantista vivo en Blagoveŝĉensk lasttempe plivigliĝas kaj progresas. Ĉiusabate oni kunvenas en la Ĉambro de Instruista Unuiĝo. Dum lasta kunveno, okazinta la 10 novembro, oni decidis malfermi kursojn kaj komenci propagandon inter lernantoj kaj laboristoj. Por diversaj klopodoj kunveno elektis du personojn, sinjoron Bzìnìkìn kaj Bona Espero.

Loka gazeto „Amurlanda Vero“ ofte enpresas mallongajn informojn pri sukcesoj de nia afero en eksterlando. Tial ĉiuj veraj samideanoj kaj esp. societoj estas varme petataj plej ofte sendi informojn pri progreso de Esperanto al S-ro A. D. Bzìnìkìn, Blagoveŝĉensk, Siberio, Bolŝaja str. 76.

*

Barnaulo (Altaja regiono). Jen kelkaj novaj interesaj aldonoj pri tiu kaj aliaj lernejoj. En nova jaro ankaŭ oni decidis Esperanton esti diviga por 4, 5, 6, 7, 8 klasoj. Instruistino F-ino V. Seriŝeva verkas specialan kunbildan lernolibron por infanoj. Gelernantoj jam havas vastan alilandan korespondon kun Eŭropo, Japanio, Ĉinio kaj la *lernejo asignis* por tiu celo cent rublojn (oro). „Eksperimento de instruo de Esperanto en tiu ĉi lernejo, malgraŭ malfavoraj cirkonstancoj (malhavo de lernolibroj, multekosto de korespondo), rezultigis sukceson kaj egan intereson de gelernantoj, kio estas videbla.

1. per korespondado de infanoj kun alilandoj,
2. per eldono de kvin numeroj de esperanta rondiranta gazeto (manskribita) kaj alveno el alilandoj de multaj leteroj, P. I. specimenoj de gelernantaj laboraĵoj, desegnaĵoj, instruiloj kaj lernolibroj.“

La instruisto de geografio P. Kazanskij (Siberio, Altaja gub. Barnaul, Internacia Str. 141) instruas geografi-etnografion laŭ P. I., ricevataj iam de mi (el 80 landoj kaj insuloj de 200 gekorespondintoj) kaj de aliaj samoj; la eksperimento estis tiom sukcesa kaj trafa, ke S-ro Kazanskij rapide ellernis Esperanton kaj nun mem ricevis jam korespondante 80 P. I., tre taŭgaj por la lecionoj. (Li serĉas geinterŝanĝantaj P. I., tipoj, moroj, scenoj, naturo el tutmondo). En vilaĝoj de Altaja regiono — *Siĉevka Stara Barda, Novikova* — estas serioza esperanta laboro en popola domo kaj lernejo.

Aŭstrio.

Wien. La „Libera esperantista laborkomunumo“ de la Esp.-grupoj „Danubio“, „Junularo“ kaj „Progreso“ malfermis 3 Esp.-kursojn en VIII^a, IX^a kaj XVII^a distrikto.

Organiziĝis 4 grupoj de esperantistaj bankoficistoj en Wien VII, Lerchenfelderstr. 23. Ĝi celas interesigi per internaciaj raportoj pri la bankoficista nacia movado la regnan organizaĵon de la bankoficistoj. Ĝi petas samideanojn-kolegojn pri alsendo de taŭga materialo kaj detalaj raportoj.

La „Akademia Esperantista Unuiĝo en Wien“ refondiĝis kaj deziras interrilati kun studentoj de altlernejoj. Adreso estas: Wien I, Universität.

Britlando.

Aperis la „International Language“ bonega anglalingva revuo por la disvastigo de la ideo de L. I. Abonebla ĉe British Esperanto Association, 17 Hart street, London W. C. 1.

Ĉe grava eduka konferenco en London parolis favore de nia lingvo S-ro Sarolea, lingvisto el Edinburga Universitato. Subtenis liajn parolojn ĉeestinta profesoro Bovet, direktoro de la Instituto J. J. Rousseau en Genève kaj S-ro Findlay, profesoro ĉe la Universitato de Manchester.

La Londona Komerca Ĉambro ree organizos ekzamenojn pri Esperanto. Enskribo por la unua ekzameno antaŭ fino de marto 1924.

Franclando.

La Lernejo de Supera Komerca Instruado por Fraŭlinoj en Paris, privata lernejo, subvenciita de la ŝtato kaj direktata de F-ino Sanua (Komitatanino de „Esperanto kaj Komerco“) post provo de nedeviga enkondukis la devigan instruadon de Esperanto.

En *Javisy* (apud Paris) du kursoj.

La direktoro de la Supera Komerca Lernejo de *Clermont-Ferraid* akceptis la honoran prezidon de loka grupo.

La komerca firmao Baudet et Douon (S-ro A. Baudet estas membro de la Pariza Komerca Ĉambro) en Paris traktas nun en Esperanto aferojn kun Palestino.

Finnlando

La finnlanda parlamento denove voĉdonis la sumon de 25.000 Fmk. (tio estas pli ol 3500 svisaj frankoj) por la instruado de nia lingvo.

Germanio.

Bochum (Westfalio). Tre bone vizititan propagandan vesperon aranĝis la Del. de UEA en Bochum, S-ro D-ro Wullen. Ĉeestis 300 ne-esperantistoj. La paroladon faris la Del. de Essen, S-ro O. Sandrock. Per provleciono D-ro Wullen montris la facilecon de Esperanto. Anonciĝis por kursoj pli ol cent personoj. La malbonegaj ekonomiaj cirkonstancoj kaj senlaboreco malhelpis multe. Tamen 60 kursanoj restis fidelaj al sia kursestro D-ro Wullen.

Chemnitz. Vesperfesto kristnaska kun deklamaĵoj. S-ro Richter-Anschütz, la ludinto de la ĉefrolo en „Nathan la Saĝulo“ dum la Nürnberga Kongreso prezentis profundpensan ringfabelon el tiu teatraĵo.

Essen. Nova Esp.-kurso de 32 personoj en la „Akademiaj Kursoj“. Kursgvidanto S-ro H. Reuss.

Hochemmerich (N.-R.) En la Popola Altlernejo okazis propaganda parolado de S-ro O. Sandrock, Del. de UEA en Essen, antaŭ multnombra aŭskultantaro. Sekvis kurso, gvidata de S-ro, rektoro E. Desch el Homberg (N.-Rhein), kun 60 regule partoprenantaj personoj.

Jugoslavio.

Bjelovar. En nia urbeto fondiĝis esperanta klubo. La estraro konsistas el jenaj sinjoroj: D-ro V. Peičić, kuracisto; vicprez.: Prof. R. Schey, gimnazia instruisto; sekr.: F. Poljan, poŝtoficisto; kas. kaj bibl.: D. Došek, razisto.

Ni komencis du kursojn, unu por urbanoj kaj la alia por laboristoj. La unua jam finiĝos post kelkaj tagoj. Al la laŭdinda klopodo de S-ro Vřepelka, gvidanto de unua kurso, ni devas danki, ke nia lingvo ricevis novajn geamikojn kaj geanojn. La laborista kurso gvidata de S-ro Poljan tre bele progresas kaj promesas bonan sukceson.

En *Zeunen* post fermita 3-monata Esperanto-kurso estis fondita „Esperanto-Klubo Mojsije Paič“ kun 15 geanoj. (Mojsijè Pajić, Zeunenano estis famekonata pazigrafiisto en la XVIII. jarcento.)

Italio.

En *Bari* S-ro Lacalendola, del. de UEA, profesoro de albana kaj rusa lingvoj en la Komerca Universitato, malfermis dum tiu ĉi januaro kursojn de Esperanto en la R. Komerca Instituto, R. Mara Instituto, Nacia Kolegio, Kolegio Nasuti, ĉefepiskopa Seminario.

(Itale: R. Instituto Commerciale, R. Instituto Nantico, Convitto Nazionale, Convitto Nasuti, Seminario Arcivescovile).

Esperanto treege progresas en la lernejoj de Bari. Inter la lernantoj de tiuj ĉi kursoj estas 18 albanaj studentoj.

Torino. S-ro Franco Ramolfo, fervoja sekretario, organizas la „Italan Fervojistan Asocion“. Jam aliĝis al ĝi la fervojistaj grupoj de Roma, Voghera, Mantova, Udine, Verona, Gorizia.

Adreso: Piazza Carlo Felice 12 aŭ Via Nizza N. 12, Torino.

Udine. La 21 decembro F-ino Wanda Asquini el Trieste, en ĉambrego de Udine'a Popola Universitato, parolis pri Esperanto antaŭ kelkcentoj da aŭskultantoj. Sekve de tio komenciĝas kurso trimonata sub la aŭspicioj de Popola Universitato, kies prezidanto D-ro P-ro Enriko Morpurgo multe simpatias kaj apogadas nian movadon. Samideano Johano Della Savia gvidas la kurson, kiu estos la dua okazanta en Udine (ĉefurbo de Friulo) depost la fino de mondmilito.

Rumanio.

Alba-Julia (Transilvanio). La tiea esperantistaro la 21 dec. unuafoje kunvenis en la nova kunvenejo, salono en kafejo „Europa“, decidis fondi grupon kaj malfermi kurson.

Bolgrad (Besarabio). S-ro Eugeno Ivanov, Del. de UEA, malfermis kurson kaj favore propagandas Esperanton.

Bucuresti. En ŝtata liceo „Spiru Haret“ speciala kurso por 70 liceanoj.

La oficistaro de Esp.-Centro Rumana pliiĝis per samideano D. Tejuŝan, estinta sekretario de la Esperantista Grupo en Targul-Mures (Transilvanio) kaj fervora kursgvidanto.

La 19an de decembro vizitis la esperantistan grupon kaj klubon S-ro inĝeniero Harold Jackson, angla samideano el Preston, oficanta nun ĉe la rumana petrolekspluato.

Cernauti (ĉefurbo de Bukovino). La Berlitz-lernejo dungis S-ron majoron A. Hasenöhrl, Del. de UEA, kiel instruiston de Esperanto kun monata salajro. La sama lernejo decidis doni atestojn al la personoj farintaj ekzamenon de Esperanto.

Ludoŝul-de-Mureŝ (Transilvanio). S-ro Andreo Allesz, Del. de UEA, malfermis la 6an de decembro novan kurson por 12 partoprenantoj.

Piatra Neamtz. La 16an de decembro fondiĝis „Societo Esperantista D-ro L. L. Zamenhof“. Por honora prezidanto estis elektata S-ro N. Alexandrescu Guranda, direktoro de la Banko Petrodava kaj prezidanto de l' Komerca Ĉambro. Fervore agadas por propagando kaj organizo S-ro J. M. Creizel.

Turnu-Severin. Formiĝis grupo de esperantistoj. La gvidanto estas S-ro S. Buclesu.

DOKUMENTOJ.

Normala Lernejo por Knaboj
en Gradistea-Vlaska
1923, monato decembro,
tago 10-a.

Traduko el rumana.

Al estimata Esperanto-Centro Rumana
Alea Suter 19, *Bukuresti.*

Konvinkitaj pri la graveco de la lingvo Esperanto ni decidis malfermi tian kurson por la lernantoj de la Normala Lernejo por Knaboj en Gradistea-Vlasca, same kiel ankaŭ por la lernantoj de la Korektiga Lernejo.

Sekve de tio ni havas la honoron peti vin por bonvole disponi pri la nomigo de du sinjoroj profesoroj, ĉar la nombro de la enskribitaj lernantoj estas 300 ĉe la Normala Lernejo kaj 70 ĉe la Korektejo.

La direktoro: *Teodorescu* pm.

Noto: Normala lernejo en Rumanio estas preparejo de instruistoj.

*

MARIA, reĝino de Rumanio, permesis traduki siajn verkojn en Esperanton.

Ŝia Moŝto Maria, reĝino de Rumanio, konata ankaŭ kiel aŭtorino de rimarkindaj verkoj beletristikaj, donis permeson al Rumana Esperantista Societo, por traduki ŝiajn verkojn en Esp.

XVIa Universala Kongreso de Esperanto en Wien — Vieno, 6—13 aŭgusto 1924.

Leter- kaj telegram-adreso: **Esperanto-Kongreso, Wien.**

La unua bulteno.

La esperantista gazetaro kaj ankaŭ kelkaj nacilingvaj ĵurnaloj jam raportis pri la decido de la Centra Komitato en Paris dum septembro 1923, okazigi la XVI-an Universalan Kongreson de Esperanto 1924 en Wien — Vieno (Aŭstrujo).

La Konstanta Kongresa Komisiono (K. K. K.) interkonsente kun la lokaj organizoj esperantistaj en Wien — Vieno aprobis dum oktobro kaj novembro 1923 la al ĝi proponitan nomaron de la Lokaj Kongresaj Komitatanoj (L. K. K.).

Nun la L. K. K. dissendas la oficialan inviton al la XVIa kiu — 12-paĝa — enhavas krom ĝenerala saluto al la tutmonda esperantistaro kelkajn sciigojn pri la kongresurbo Wien kun vidindaĵoj en tiu urbo kaj la unuan raporton pri ĝis nun anoncindaj preparaj laboroj por la kongreso.

Aliĝilo almetita kaj resendota de la ricevinto al la L. K. K. prezentas kotiz-tabelon preskaŭ egalan kun tiu por la XVa en Nürnberg.

Specimenoj de la oficialaj kongres-salutmarkoj estas aldonitaj, ankaŭ speciala respondilo.

Kiu ankoraŭ ne ricevis inviton, tuj postulu ĝin sub la simpla adreso: *Esperanto-Kongreso, Wien.*

La Loka Kongresa Komitato: *Schade,* ĉefsekretario.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

OFICIALA INFORMILO.

Elekto de la Komitato. Pro malsano de la Prezidanto okazis malfruiĝo pri la elekto de la nova komitato ĉe la fino de 1923. Ĝi devos okazi nun sen plua prokrasto kaj ni petas la delegitojn kaj membrojn, ke ili bonvolu tuj sendi laŭ la statuto siajn proponojn pri kandidato. La proponotaj nomoj aperos en venontaj numeroj de „Esperanto“. La elekto okazos tuj poste. La jenaj komitatanoj deklaris sin pretaj akcepti reelekton:

S-ro Blaise, S-ino Blicher, S-ro Carles, S-ro Génermont, S-ro Hromada, S-ro Karsch, S-ro Křepelka, S-ro Linares, D-ro Metzger, S-ro Minkov, S-ro Page, S-ro Petiau, D-ro Privat, S-ro Rockmann, S-ro Setälä, D-ro Stamatiadis, S-ro Stettler, S-ro Szabunievicz, S-ro Tellini.

Kandidatoj proponitaj: S-ro Gustav Scholze, Liberec-Reichenberg (Ĉeĥoslovakio); S-ro D. E. Parrish, Buffalo (N. Y. Usono).

Universala Esperanto-Asocio.

Vicprezidanto:
D-ro Privat.

Ĝenerala Sekretario:
H. Jakob.

* * *

Kvaronjara statistiko. La Centra Kaso enskribis kotizojn:

novembro:	11 HM	45 M	133 MA	3 MS	Sumo: 192
decembro:	1 „	109 „	393 „	17 „	„ 520
januaro 24:	14 „	120 „	1100 „	31 „	„ 1265
Sumo:	26 HM	274 M	1626 MA	51 MS	Sumo: 1977

Nacia prezo por Ĉinio. De nun ĉinaj membroj rajtas pagi aŭ favora prezo:

Kotizoj de:	M	MA	MS
Mono: Arĝ. Dol.:	1,40	3,50	7,—

Pagmaniero: Per ĉeko laŭ taga kurzo en svisa, angla, aŭ alia praktika pagilo.

Partpagoj. Pro la intertempa ŝanĝo de kondiĉoj la sistemo de partpago ne estas daŭrigata. Tio koncernas Hungarion kaj Pollandon.

Konfirmo de enkasigo-rajto. Ni konfirmas ĉi-tie la rajton de nia ĉefdelegito en Hungarlando, Sinjoro Paulo Balkanyi, akcepti pagojn por ni el la tuta teritorio. Pro la necerta monstato ni ankaŭ rajtigis lin altigi la kotizon en nacia mono laŭbezone. Ni konigas la kotizojn por la nuna monato:

M	MA	MS	
12000	30000	90000	Kr. papero.

Okaze de *grava* kurzofalo la ĉefdelegito aŭ la C. O. reskribos al tro malmulte sendintaj personoj.

Teritorio Berlin. La membroj de UEA kunvenis la 3 januaro kaj laŭ iniciato de S-ro Blankenheim fondis „Teritorion de UEA“ Berlin. Kiel ĉefdelegiton oni elektis S-ron Max Blankenheim, Stubenrauchplatz 5, Berlin-Steglitz.

Oficiala kaj formala konfirmo de la Komisiono de UEA aperos en venonta numero de „Esperanto“. Intertempe la ĉefdelegito funkcias provizore.

Garantia kapitalo.

Unua serio:	Frankoj svis.
Antaŭa listo	9625.—
Akiris kvinan ateston de la unua serio:	
S-ro G. Douglas-Buchanan, Glasgow	100.—
	Fr. 9725.—

Subtenantoj.

Unua listo:

1. S-ro Marcelo Maldonado, San José, Costa Rica; 2. S-ro Yanagita, membro de japana delegacio ĉe Ligo de Nacioj, Genève; 3. S-ro P-ro Kobajashi, membro de japana delegacio ĉe la Internacia Labora Konferenco, Genève; 4. S-ro Anakreon Stamatiadis, Samos-Vathy, Greklando; 5. S-ro Georges de Plançon, Cevins, Francio; 6. S-ro Paul Bouvier, Genève; 7. S-ino Maria van Rees, Wilderswil, Svis.; 8. S-ro Jules Soisson, Sens; 9. S-ro Edv. Alf. Hansen, Aalborg, Danmarko; 10. S-ro James R. Miller, Stone, Staff.; 11. S-ro Robert W. Mcfarlane, Port Glasgow; 12. S-ro J. D. Applebaum, Liverpool; 13. S-ro Frank H. Lockyer, Liverpool; 14. S-ro Fidia Cesarini, Potenza; 15. S-ro O. Haller, Rorschach; 16. S-ro D-ro Fousek, Přelouč; 17. S-ro L. E. Thompson, Sydney; 18. S-ro Fidele Nigg, Gersau; 19. S-ro D-ro Vincze Toth, Budapest; 20., 21. S-ino kaj S-ro Schafroth en Burgdorf, Svis.

Ĝis la bezonata nombro de 400 Subtenantoj mankas ankoraŭ pli ol 350 aliĝoj. Ni rememorigas al niaj bonvolemaj samideanoj, la avantaĝon kiun ili rajtas, pagante kotizon de Membro-Subtenanto (duoble la kotizo de MA en la plimultaj landoj). Krom jarlibro, gazeto dum tuta jaro ĉiu Subtenanto ricevas premion konsistantan el la jenaj verkoj:

1. Fundamenta Krestomatio de la Lingvo Esperanto de D-ro L. L. Zamenhof, 460 paĝoj, 12 × 18,5 cm. (Enhavas aron da fabloj, legendoj, anekdotoj, rakontoj de diversnaciaj aŭtoroj, originalaj artikoloj, verkitaj de la majstro kaj de la pioniroj de nia movado, artikolojn el scienco kaj naturo, poezio.)
2. Vortaro de Esperanto. Kompilita de Kabe (Kasimierz Bein). 175 paĝoj, 14,5 × 20,5 cm, bindita. Vortoj kun akompana klarigo en Esperanto.
3. Sendaĵo enhavanta la jenajn verkojn: Edm. Privat: Vivo de Zamenhof; Historio de la lingvo Esperanto; Turgenev: Elektitaj Noveloj; Puŝkin: Tri Noveloj; Niemojewski: Legendoj; Hildebrand: El la Camera obscura. Plie aldono de po unu ekzempleroj de raportoj pri la konferencoj en Genève kaj Venezia, esperante, france aŭ germane.

Okaze de elĉerpiĝo de unu el la libroj de sendaĵo N-ro 3, ni anstataŭos per alia samvalora verkaĵo.

Ŝanĝoj.

Antwerpen (Belgio). — D.: S-ro Franz Schools, Kleine Hondstraat 11.

Barcelona (Hispanio). — D.: S-ro Delfi Dalmau, profesoro, Carrer Valencia 245.

Bolgrad (Rumanio). — D.: S-ro Eugeno Ivanov, studento, Str. Scoalei 50.

Cluj (Rumanio). — D.: F-ino Eugenia Morariu, oficistino, Calea Traian 40.

VD.: S-ro Samuil Sámuel, oficisto, Str. Universitătii 5.

Hagen (Germanio). — D.: S-ro Walter Rose, komercisto, 770, Altenhagenerstrasse 86, I.

Königsberg (Germanio). — D.: S-ro Paul Fast, komercisto, Kaiserstrasse 16. VD.: F-ino Dora Litfas, Kaiserstrasse 17.

Komerca delegito: S-ro Georg Kossak, komercisto, Schnürlingstrasse 19.

Manchester (Anglio). — D.: S-ro E. T. Doran, presisto, 62 Talbot Road, Old Trafford.
VD.: S-ro Isaac Henry Wright, inĝeniero, 7 Abington Rd., Brooklands.

Novi Sad (Jugoslavio). — D.: S-ro Marko Neŝic, komponisto, Despota Jovana ul. 13.
VD.: S-ro Francisko Csauth, posedanto de puriga entrepreno, Petefijeva (Kazinci) ul. 3.

Saalfelden (Aŭstrio). — D.: S-ro Hans Wallinger, fakinstruisto, Apotheke.

Samos-Vathy (Greklando). — D.: S-ro D-ro Heraklis Krikijannis, kuracisto.
VD.: S-ro Thalis A. Sinefias, komercisto.

Stuttgart (Germanio). — VD.: S-ro Paul Christaller, profesoro, Neue Weinsteige 61.

Ustí nad Orlicí (Ĉeĥoslovakio). — D.: S-ro Antonin Barkman, instruisto.

Werdau (Saksio). — D.: S-ro Herbert Taubold, mekanikisto, Rahmenberg 6.

Provizore ne plu estas Delegitoj en jenaj lokoj:

Altenburg (Germanio), *Altona* (Germanio), *Arzew* (Alĝerio), *Aschmeritz* (Ĉeĥoslovakio), *Báez* (Kubo), *Eisleben* (Germanio), *Enschede* (Nederlando), *Haddington* (Skotlando), *Heerewaarden* (Nederlando), *Leszno* (Pollando), *Los Gatos* (Usono), *Markranstädt* (Germanio), *Momence* (Usono), *Osijek* (Jugoslavio), *Resita* (Rumanio), *Rockford* (Usono), *Rüstringen* (Germanio), *Unter-Franzenstal* (Ĉeĥoslovakio).

* * *

Genève, 20a de januaro 1924.

H. Jakob,
Ĝenerala Sekretario de UEA.

Tra la Gazetaro.

∴ *Literatura Mondo*“ bezonus nur 600 abonantojn por vivi kaj ĝi havas sole 300. Tio estas vera domaĝo, ĉar en Esperantujo ĝi plenumas la utilan rolon de bonega, ekskluzive belarta kaj literatura gazeto kun artistaj ilustraĵoj kaj ĉiam alta gusto en la stilo. Ni alvokas al la atento de niaj literaturamantoj la valoran laboron de ĝiaj redaktoroj kaj eldonantoj. Multaj malpli utilaj kaj malpli bonstilaj organoj vivas. Estas pli juste koncentrigi fortojn por subteni la plej bonajn. Petu specimenan numeron de la administracio, Andrassy utca 81, Budapest VI, kontraŭ sendo de 0,80 Fr. sv. aŭ egalvaloro.

∴ *„Interligilo de l' P. T. T.“* estas la tre lerte redaktita organo de niaj poŝtistoj kaj telegrafistoj. La januara numero entenas tre interesajn artikolojn pri profesiaj aferoj en Francio, Pollando, Hispanio, Nederlando, Ĉeĥoslovakio, Latvio, Arĝentina Respubliko, Britlando, Bulgario kaj Estonio. Ankaŭ ĝi enhavas teknikajn artikolojn pri hor-datantaj ŝtampiloj, aŭtomataj presiloj kaj plenan adresaron de la P. T. T.-organizaĵoj kaj -gazetoj nacilingvaj en la tuta mondo. La redaktoro, S-ro Filliâtre, 54 rue Custine, Paris XVIII, invitas ĉiujn interesatojn je T. S. F. sendi al li artikolojn kaj uzi la gazeton por interligiĝi. La abono kostas nur 5 francaj frankoj jare.

Helpu ŝpari

sendante duoblan poŝtkarton kiam vi petas informon de la Centra Oficejo de UEA.

La kosto de afranko estas la plej alta en Svislando.

INTER NI

Granda okazintaĵo aperis en Granda Britlando. *„International Language“* estas la titolo de la nova propaganda gazeto angla, fondita de S-ro Edmonds. De nun „British Esperantist“ limiĝos je 4-paĝa bulteno kaj la riĉa propagandilo 24-paĝa servos kiel disvastigilo de nia lingvo en Granda Britlando kaj ankaŭ en multaj aliaj lokoj, kie la angla lingvo estas legata.

Ni kore gratulas S-ron Edmonds pri lia kreaĵo, kiu devus utili kiel modelo al ceteraj. La unua numero entenas bonegajn artikolojn de diversaj famuloj pri la mondlingva problemo, pri la progresoj de Esperanto, pri ĝia neceseco por radio-disaŭdigo, pri la Paskaj kunsidoj en Ĝenevo kaj kelkajn paĝojn de facilaj Esperanto-tekstoj en aldono: „La Juna Lernanto“.

La tuta gazeto spirigas atmosferon larĝan, seriozan kaj altnivelan. Ĝi povos servi kvazaŭ propaganda broŝuro en ĉiuj rondoj. Ĝi lasas flanke la internajn pure esperantistajn aferojn por interesi la kleran publikon al nia afero kiel al la plej praktika solvo de grava homara problemo. Tipa estas la unua artikolo de D-ro Howard Tripp, anoncanta en la nomo de la Brita Asocio de Sciencoj, ke ĝia enketa komitato pri la mondlingva problemo decidis nun rekomendi la uzon de Esperanto, ĉar tiu lingvo estas multe pli disvastigita ol Ido kaj ĉar sperto montris, ke ĝi estas kontentiga por ĉiuj ordinaraj celoj. Antaŭe la komitato ne volis konkludi inter Esperanto kaj Ido, sed nun ĝi decidis, ke rekomendi du mondlingvojn egalas rekomendi nenian kaj ĝi informos la Ligon de Nacioj pri sia denuna intenco publike subteni Esperanton por akceli la sukceson de mondlingvo en la mondo. La estonto alportos la necesajn pliriĉigojn.

Tiu decido estas tre grava por nia afero kaj la fondo de „International Language“ alvenas en tre oportuna horo. Se anstataŭ tiom da malfacile vivantaj esp. gazetoj, ni havus unu bonan internacian organon, unu belan literaturan, unu seriozan sciencan revuon kaj krom tio bonajn propagandilojn, ne tiom laŭ nacio, sed laŭ lingvoj, nia afero kredeble fartus multe pli bone.

Se „France-Esperanto“ kaj „Germana Esperantisto“ fariĝus „La Langue Internationale“ kaj „Die Welthilfssprache“, se niaj hispanaj kaj sudamerikaj amikoj unuiĝus por vivigi similan „Lengua Internacional“, tiam ili povus ricevi subtenon de ĉiuj naciaj societoj en la diversaj landoj kie paroliĝas tiuj lingvoj, franca en Svislando, Belgio, Kanado, Haiti kaj en diplomataj rondoj ĉie, germana en Svislando, Aŭstrio, Centra Eŭropo, Balta Maro, hispana en tuta Sudameriko.

Oni lasus la pure esperantistajn aferojn al bultenoj aŭ eĉ al aparta kolono de nia centra internacia organo kaj oni komencus seriozan propagandon ĉe la vere klera publiko ne timigante ĝin per verdstelaj poemoj kaj „internaj“ entuziasmaĵoj, kiujn la eksteraj homoj ne povas kompreni.

Oni ŝparus monon kaj triobligus la rezultatojn. Ĉu ankaŭ tio ne valoras pripenson?

La abonprezon de *„International Language“* estas nur 2 ½ ŝilingoj por 12 numeroj jare ĉe: 17 Hart Street, London WC. 1. Vidu ĝin, kaj vi komprenos nian esperon.

Esperantista Vivo.

Fianĉiĝo. — F-ino *Pepi Köhler* en Mähr.-Neustadt (Ĉeĥosl.) kun S-ro *Franz Holeschinsky* en Meppel (Nederl.)

Edziĝo. — F-ino *Albertine Le Bris* kun S-ro *Paul Fernac*, ambaŭ anoj de UEA en San Francisco.

S-ino *Marie Hankel* en Dresden festis la 2 Februaro 1924 sian 80-an naskiĝtagon. Ĉiu el la pli malnovaj esperantistoj konas nian simpatian, ĉiam entuziasman kaj senlace laborantan samideaninon — ŝi ja partoprenis ĉiujn Esperanto-kongresojn de 1907 (Cambridge) ĝis 1913 (Bern), ŝi kunlaboris kiel ano de la „Kvaro por la kvara“ en la organizo de la modela Dresdena kongreso 1908, multaj de niaj Esperanto-gazetoj aperigis literaturajojn de ŝi, kaj elekto el tiuj laboroj aperis en plaĉa volumeto sub la titolo „Sableroj“. Marie Hankel estas anino de la Lingva Komitato, fondis la E. L. A. (Esperanta Literatura Asocio) kaj havas korespondantajn geamikojn en la tuta mondo. Malgraŭ la alta aĝo, kiu Marie Hankel detenis de la partopreno de la lastjaraj kongresoj, ŝi ankoraŭ nun vigle laboras por nia afero, regule vizitas la kunvenojn de G. E. A., loka unuiĝo Dresden, kiu jam antaŭ multaj jaroj nomis ŝin „honora membro“, kaj ĉiulunde ŝi gvidas sian „orientan grupon“ kunvenante en la bela hejmo de Marie Hankel, kie ŝi ofte vidas Esperanto-gastojn el plej diversaj landoj kaj iam ankaŭ gastigis nian majstron D-ron Zamenhof, P-ron Cart, D-ron Privat k. a.

Ke favora sorto gardu nian altŝatatan samideaninon ankoraŭ dum multaj jaroj sane kaj freŝe kiel ĝis nun kaj orumigu de ŝi la vivvesperon — tio estas la sinceraj deziroj de la esperantistaro tutmonda!

Joh. Karsch, Dresden.

Niaj mortintoj.

Kun bedaŭro ni ricevis informon pri la morto de jenaj samideanoj. Al iliaj familioj ni sendas la esprimon de niaj respektplenaj kondolencoj.

S-ro **Lucien Decourt,** profesoro en la liceo Michelet en Vauves (apud Paris) mortis la 31 decembro 1923. Li estis malnova lerta samideano, unua prezidinto de la Federacio de Centra-Okcidenta Francujo en 1909, komitatano de la S. F. P. E., por kies renovigo li tiel multe laboris depost 1921, same kiel por la Federacio de la Parisa Regiono. Ne nur la Parisaj, sed la francaj samideanoj perdas en li viglan kaj senlacan batalanton, kies spertoj tiel servis al la movado. Ĉe la enterigo S-roj de Ménil kaj Conteaux parolis nome de Esperanto-grupoj.

S-ro **Luigi Scarselli,** agema samideano, mortis en Firenze (Italio) la 15 decembro. Li estis instruisto ĉe la Komunumaj Lernejoj kaj tre fervora propagandisto. Li reprezentis Italion ĉe la tria internacia kongreso de Cambridge. Li estis delegito de UEA kaj docento de Itala Katedro de Esperanto. Li verkis ŝatatan „Marŝon de Esperantistoj“ kaj propagandajn artikolojn. De longtempo li malbone fartis kaj ne povis sin okupi pri nia movado.

S-ro D-ro **Antonio S. Briceno** mortis en Barquisimeto (Venezuelo) dum oktobro 1923. Li estis la unua delegito de UEA en Caracas, ĉefurbo de Venezuelo, sed ne plu aktive partoprenis la movadon.

ŜAKO

Gvidanto: *Fr. Hájek,* Praha-Nusle, Přemyslovo nábř. 396. Ĉeĥosl.

Ĉion kio koncernas ŝakon, sendu senpere al la gvidanto.

Problemo N-ro 99.

B. G. Laws, London.

[Originalo, korektita n-ro 83].



Blanko matas per la 2-a movo.

Problemo N-ro 100.

W. Holzhausen.

[National Zeitung, Basel 1923].



Blanko matas per la 4-a movo.

Problemo N-ro 101.

H. Bolton.

[The Chess Players Chronicle 1851].



Blanko matas per la 3-a movo.

Problemo N-ro 102.

D-ro *F. Hofmann,* München.

[Reproduktajo].



Blanko matas per la 3-a movo.

Probl. 99 estas verkita en la matbilda maniero. Kvankam tiu ĉi maniero jam de longe elĉerpis sian programon, tamen ĝin uzas ofte en la lastaj jaroj la anglaj verkistoj. Oni vidas, ke tiun simplan verkon kunmetis tre bona spertulo. — N-ro 100-a memorigas al ni la praktikan ludon. Preskaŭ senmateriala kaj tamen sufiĉe malfacila. Temas pri tio kiel malhelpi al Nigro la influon sur g 1 per la nigra Kuriero. Per tiu ĉi influo penas Nigro lamigi sian enŝlositan Reĝon. — La du lastaj trimovaj problemoj prezentas la teknikon de la ĝusta figuriĝado de la Peono. La unua preskaŭ ŝercas per sia simpleco, la dua estas vera perlo. Per ĝi oni estas bone instruata pri la diversa valoro de la figuroj en la problemo.

Solvoj de la problemoj:

N-ro 97: 1. Dh2—e2, d5—d4, 2. e3×f4 m; d5×e4, De2—b5 m; f5×e4, De2—h5 m; Re5×e4, Tg6—e6 m.

N-ro 98: 1. Ĉh6—f5, Tf7×f5, 2. Dd3×f5; Tf7×g7, Ĉg6—f8m; Tf7—f8+, 2. Ĉg6×f8 m; Tf7—f6, 2. Tg7×e7m; e7—e6, 2. Ĉg6—f8 m; e7—e5, 2. Tg7×f7 m; Ĉa8—c7, Ĉg6—e5 m; Ĉb3 laŭvole, 2. Dd3×d4 m.

Alvenis ĝustaj solvoj de la problemoj:

N-ro 93 ĝis 96 H. Sentis, Grenoble; 93 S. Frantz, Paris; W. Chmellarz, Teplitz-Schönau, Ĉeĥ.; 93, 95, 96 R. Koerselman, Voorst, Nederl.; W. Smolén, Grabów, Pol.; 91, 92 Andreo Kraljevič, Bjelovar, Jugosl.; 94, 96 G. Meyer, Wien, Aŭstrio.

Korespondo: S-ro H. F. Bailey. Dankon por via klarigo. Ni korektas laŭ via komuniko.

Literaturo: En jaro 1907 estis aperigata duonmonata revuo *The Chess Review*, kiu enhavis ŝakfakon en Esperanto de la konata ŝakverkisto E. T. Blanshard. Redaktoroj de tiu revuo estis F. Baird kaj E. Millins, 14 Milton Terrace, Rose Hill, Pendleton, Manchester. Ĉar la afero ne estas konata en nia rondo, estus rekomendinde serĉi pri la verko en la bibliotekoj de la britaj ŝakaj kluboj. Eble la verko enhavis utiligeblajn fakterminojn, aŭ liveris alian por ni valoran laboron.

Reprezentantoj

serĉantaj facilvendeblan, malkaran, profitodonan komercajon,

skribu al

sinjorino Petit, delegitino de UEA,
33 rue Chabot-Charny, Dijon, Franclando.

Serioza kaj findinda. — Respondo certigata.

Eleganta WIKTORIN Belaspekta

La mondkonata alkoholarda lampo



bezonas nur unu litron da alkoholo por 120 lumhoroj uzebla kiel tablolampo, pendolampo kaj lanterno. Ekipo: Vera latuno solide nikelizita.

Specimenoj estas riceveblaj kontrau pago Ŝil. 7.50 aŭ samvaloro en alinacia valuto.

Postulu prospektojn!

Plej granda ŝparemo. Nepre sendanĝera, neeksplodema.

Kurt Pinger, Leipzig-Lindenau, Leutzscherstr. 45.

Kuracisto (hebrea, mezaĝa) **serĉas postenon** laŭeble hospitalan, eksterlande.

Proponojn peras

H. Wittenberger, Delegito de UEA, Anina (Rumanio, Banat).

☆ ☆ ☆
☆
☆

Ĵus aperis:

AKBAR

Orienta romano de **P. A. S. van Limburg Brouwer,** tradukita de **J. C.** kaj **J. R. G. Isbrücker** kaj **J. Ziermans,** rekomendata de Esperantista Literatura Asocio.

Prezo por bonvalutaj landoj 1,80 hol. guldenoj + afranko. — Mendebla ĉe:

J. R. G. Isbrücker,
v. Beverningkstraat 10,
s'-Gravenhage, Nederlando.

Fundamenta prezo por malbonvalutaj landoj 3,60 or-markoj. — Mendebla ĉe:

Ellersiek & Borel, G. m. b. H.
Wilms-Strasse 5,
Berlin SW. 61, Germanujo.

☆ ☆ ☆

„LA FEDERACIO DE LA MONDO"

Enlanda paciĝo kiel bazo por eksterlanda kunlaborado per la nova metodo de la Unismo.

„Kie ne vidiĝas vizio; tie pereas la popolo."

☆

Kiam industrie kaj ekonomie la situacio en diversaj landoj fariĝos nesuferebla kaj ĥaoso minacos, tiam devos agi la popoloj. Sed kiamaniere — detrueme aŭ konstrueme?

Jen nia pacema sed efika metodo.

Por pace kunigi la popolojn estos bezonata facile komprenebla kaj konstrua plano — unue por estigi kunagadon en ĉiu lando, due por ebligi interkonsenton internacian. Deklamado kontraŭ la milito ne sufiĉos. Oni devas detrui la incitaĵojn por batali per rekonstruado de la socia sistemo laŭ principoj kooperativaj. Tiucele „La Federacio de la Mondo" posedas taŭgan planon por gvidi la homaron. Simpatiemuloj estas invitataj, ke ili fondigu senprokraste edukajn grupojn de tri aŭ pli membroj por akcepti, diskuti kaj diskonigi kiel bazon por mondligado la tri jenajn principojn:

a] Por certigi tipon de registaro demokrata kaj tolerema, sed samtempe efika, ĉiu parlamento devas fariĝi vera reflektilo de ĉiaj kategorioj de publika opinio per sistemo de proporcia reprezentado. Ĉi tiu permesos, ke ĉiuj politikaj kaj industriaj grupiĝo povu elekti reprezentantojn justmaniere t. e. proporcie laŭ la nombro da voĉoj respektivaj. Diversaj valoraj ideoj kaj idealoj tiel taŭge esprimiĝos parlamente. Jen bazo dezirinda por kooperativa registaro je kiu ĉiuj partioj partoprenos respondecon. Spertuloj tamen en maniero simila al la svisa administracio devas kontroli la fakojn de la ŝtato.

b] Por ebligi decan funkciadon de tia registaro nia dua principo liveras novan planon. Nuntempe troviĝas granda konflikto inter ia malnova sistemo — ĉe kiu privataj individuoj kaj grupoj agas kiel kontrolantoj — kaj ia nova sistemo — ĉe kiu komunuma aktiveco intencos ludi la ĉefan rolon. Ni aludas al la problemo de la „kontrolo de industrio". La individualistoj estas determinintaj, ke privataj personoj kaj grupoj konservu sian kontrolon de la maŝinaro de produktado kaj de distribuado. La socialistoj ĉiaj intencas, ke tiu ĉi maŝinaro estu iamaniere sub la kontrolo de la ŝtato aŭ komunumo. Solvo de la demando ebliĝos per nia plano de „La Unismo" kiu indikas kie individua aktiveco estas permesebla kaj ankaŭ difinas la sferon por la komunumo...

La Individuo devas produkti.
La Komunumo devas distribui.

t. e. individuoj, kompanioj, laboristaj grupiĝoj, kooperativaj organizaĵoj ktp. havos la rajton uzi mono-kapitalon, laboron kaj direkcian kapablecon por funkcii kaj eksperimenti laŭ sia propra risko en la medio de produktado aŭ kompare aŭ urbe. La komunumo tamen intencos organizi distribuadon — kiu ampleksas la maŝinaron de konservado, transportado kaj disdonado pogranda kaj pomalgranda — per la unisma metodo kuniganta la rektajn sistemojn de S-ro Hoover kaj de la kooperativaj disdonadaj societoj. Por ĉiuj produktantoj troviĝos okazo por vendi kaj samtempe organiziĝos la popoloj kiel konsumantoj.

c] Kiel tria principo la membroj de la Federacio konsentos pri „Libera esprimado de opinioj kaj zorga konsiderado de aliaj reformemaj politikoj." Post la enkonduko de „nepartia registaro", kun apliko de la kompromiso pri la kontrolo de industrio, fariĝos pli efika tia libereco per kiu oni povos pritrakti je taŭgaj reformoj pri la tero, edukado, financo, eksterlandaj rilatoj ktp.

• • •

Kiu kredas, ke la supre cititaj principoj estos dezirindaj dum la mondkrizo, tiu estas libera rigardi sin kiel membro de „La Federacio de la Mondo", sen ia prokrasto aŭ pago. Grupoj faros siajn proprajn financajn aranĝojn kaj regularon por esti sendependaj de ia centrala aŭtoritato. La deĵorado por la idealo enkonduki mondpacon per pacema rekonstruado provizos komunan ligilon. Laŭplaĉe grupoj dediĉos sin al la propagando de la principoj de la Unismo kaj al la konsiderado de detaloj de apliko laŭ lokaj cirkonstancoj. Tiel en multaj landoj ekzistos komuna unuiga metodo por mondligado.

• • •

(De tempo al tempo estas eldonata internacia esperanta bulteno „La-Federacio de la Mondo" senpage havebla ĉe la honora organizanto S-ro Colin Unwin, poŝtkesto 47 [Box 47] Fremantle, Western Aŭstralia).

Esperanto-Presejo Magdeburg-N.